# VALENCIA SUNO

## 78a Universala Kongreso de Esperanto

Valencio, Palaco de la Muziko, 1993.07.24-31

**Dimanĉon, la 25-a de Julio**

**Numero 1**


### Bonvenon al Valencio!

Jen, finfine vi alvenis kaj ni ĝojas saluti vin en nia suna kaj bela urbo. La Loka Kongresa Komitato jam de kvar jaroj laboras por digne gastigi vin kaj donaci al vi ankoraŭ unu memorindan kongreson de divesnacianoj kiuj tamen sukcesis trovi komunan lingvon. Lingvon por komuniki pacon, komprenecon kaj esperon, kiujn nia mondo bezonas pli ol iam antaŭe.

Helpu al ni ke la kongreso estu sukceso. Partoprenu, agu, diskutu, kritiku, kunkreu nian komunan kongreson, aldonu viajn esperojn al la niaj. Se ni estos kontentaj, niaj streboj estos premiitaj.

*Kore viaj, L.K.K.*

### Bonvolu legi nin!

Jen via Kongresa Kuriero *Valencia Suno*. Ni celas esti via gvidilo tra la kongresa labirinto de pli ol cent programeroj, trideko da ekskursoj kaj amaseto de aliaj kongresaĵoj. Ni — kaj ni estas la redakta teamo: pli interibera ol internacia — klopodos akurate informi vi pri ĉiuj kongresaj okazaĵoj, programŝaĝoj kaj atentindaj detaloj, eventoj kaj — kial ne? — kongresaj kuriozaĵoj. Sed ne sufiĉu al vi nur legi nin; ni petas kaj atendas ankaŭ vian kunlaboron, viajn artikolojn, kontribuaĵojn kaj sugestojn.

Ni atendos vin en nia redakcio!

*La Red.*

### Antaŭkongresa Informado

Ekde antaŭ du monatoj funkciis en Madrido Gazetara Servo gvidata de Gian Carlo FIGHIERA, kiu sendis informmaterialon al preskaŭ 500 adresoj de ĵurnaloj, TV- kaj radi-stacioj kaj novaĵagentejoj. Kiel rezulto aperis diversaj noticoj, artikoloj kaj tutpaĝaj intervjuoj. La antaŭ-kongresa informlaboro finiĝis la 19-an de julio per Internacia Gazetara Konferenco. La L.K.K.-prezidanto (Augusto CASQUERO) kaj responsuloj de Hispana Esperanto-Federacio (Antonio ALONSO, Marcos CRUZ, Ana MANERO) intervenis kaj respondis al la ĵurnalistoj, kiuj vigle demandadis. Ilin multe interesis niaj lingvo kaj movado kaj detaloj de la kongreso, speciale pri la 28-a Infana Kongreseto, okazanta samtempe en la vilaĝo *Alborache*, 50 kilometrojn okcidente de Valencio.

### Teatraĵoj marde kaj ĵaŭde:



Pro la kapacito de la teatraj salonoj, kiuj ne sufiĉas por akcepti ĉiujn kongresanojn, la teatraĵoj de la marda vespero ripetiĝos ĵaŭde. Pro tio gravas ke ĉiuj kongresanoj sekvu jenan konsilon:



Marde, kongresanoj kun numeroj 0001 ĝis 0900 iru al *Teatro Principal*, kaj la ceteraj al Salono Zamenhof, ĵaŭde estu inverse.

Oni ne strikte kontrolos la biletojn, sed oni petas observi la konsilon por eviti eventualan troviziton de unu el la teatraĵoj. **Ĉiukaze, ĉiuj kongresanoj povos spekti ambaŭ teatraĵojn en unu el tiuj tagoj.**

## Aldonoj al la Kongresa Libro:

Bonvolu noti ke mankas en la kongresa programo, sed tamen okazos:

**Dimanĉe, 17:00:** Ekumena diservo en la urba katedralo (*Plaza de la Virgen*).

**Marde:** Ekspozicio pri la Historio de la laborista esperanto-movado (vd. pĝ. 30 de la Kongresa Libro), je la 13:00 en la vestiblo de la Muzika Palaco.

**Ĵaŭde:** CED - Centro de Esploro kaj Dokumentado, de la 12:00 ĝis la 13:30 en Salono Albert. (**B.v. atenti:** Salono Albert troviĝas en la alia flanko de la kongresejo: oni eniras ĝin tra la pordo en la norda flanko de la Palaco kaj trairas la restoracion.)

B.v. noti ke estas en la programo sed okazos en alia tago:

**Marde:** Koncerto Puhova/Bronŝtejn ne povos okazi marde pro malfruo de la artistaj vizoj. La koncerto okazos do ene de la programo de Internacia Scenejo, planita por la jaŭda kaj vendreda matenoj.

**IKU6:** La prelego de Eva BOJADŽIEVA ne okazos ĵaŭde sed vendrede, je la 16:00, same en Salono Régulo.

**Okazos en alia loko:** Koncerto de la pianistoj Gazdek kaj Strzelecki ne okazos en Salono Zamenhof, kiel planite, sed en la vestiblo de la Muzika Palaco, je la sama horo (12:00).

**Kunveno de la legantoj de *Eventoj*** okazos **ne** je la 16:00, sed je la 18:00, en salono Grabowski (**ne** Inglada), en la instruista lernejo.

**Kunveno pri la Amerika Agado** okazos lunde je la 18:00 en salono Hodler, en hotelo Melia.

La **Tago de la Paco** komenciĝas ĵaŭde je la 09:00 (kaj **ne** je la 10:00).

Bonvolu atenti ke pro **preseraroj en la tabela programo** aperis kelkaj evidentaj nelogikaĵoj, kiel, ekzemple:


Legantoj de *El Popola Ĉinio* kunsidos lunde ĝis la 11:45 (**ne** ĝis 12:45...).

B. Groening: la Kunsido finiĝos ĵaŭde je la 10:45, ne je la 11:45.

Ĉefdelegitoj kaj peranto kunsidos nur ĝis la 09:45, ĵaŭde.

### Konversacia Rondo n-ro 1

La kunvenoj de la rondo n-ro 1 komenciĝos dimanĉe je la 17:00 en la salono Popovič. La rondon n-ro 1 gvidos Andrzej PETTYN el Polio kaj en la programo de lia instruado estas la jenaj temoj: Bazaj principoj de memlernado de esperanto (kiel lerni por bone ellerni), spertoj de grandaj poliglotoj uzeblaj en la lernado de esperanto, utiligeblaj libroj kaj sonmaterialoj, kriterioj de bona prononcado en esperanto (tipaj eraroj kaj kiel eviti ilin), frazmodeloj kaj iliaj rolo en la ĉiutaga lingvo-uzo — kun praktikaj ekzercoj. La dua kunveno de la Konversacia Rondo n-ro 1 okazos lundon matene je la 09:00, en la salono Popovič kaj poste en aliaj tagoj laŭ la kadra programo. La celo de la kunvenoj de la rondo estas doni utilajn ugestoojn al pri memlernado, per praktikaj ekzercoj montri kiamaniere sufiĉe rapide oni povas ellerni esperanton por flue paroli en tiu ĉi lingvo. Kadre de la rondo oni antaŭ vidas diskuton pri spertoj ligitaj kun memlernado. Tial, do, se vi havas interesajn ĉi-koncernajn spertojn, venu por koncize rakonti ilin.



### Ekskursoj

Ekiro de la duontagaj eksursoj:

Lunde, la 26-an:
- D-1, 09:00
- D-3, 08:45

Marde, la 27-an:
- D-1, 09:00
- D-2, 09:45
- D-3, 08:45
- D-4, 09:00
- D-5, 09:15
- V-1, 19:00

Merkrede, la 28-an:
- E-1, 09:00
- **E-2, 08:00** (nova horo!)
- E-3, 09:15
- E-4, 09:00
- E-5, 09:15
- **E-6, 08:00** (nova horo!)

Ĵaŭde, la 29-an:
- D-2, 09:15
- D-5, 09:15
- V-2, 19:00

Vendredo, la 30-an:
- D-1, 09:00
- D-3, 08:45
- D-4, 09:00

**Postkongresaj Ekskursoj:**

Dimanĉe, la 1-an:
- P-1, 07:00
- P-2, 07:00

Partoprenontoj kunvenas vendrede, je la 11:00 en Salono Waringhien.

## Eraro en la Jarlibro'93

Humphey TONKIN afable informas ke ĉiuj liaj telefon- kaj telefaks-numerojen la Jarlibro 1993 estas malĝustaj. Jen la ĝusta listo. Bonvolu fari la necesajn ŝanĝojn en la Jarlibro aŭ alimaniere noti la ĝustajn numerojn. Dankon.

| | |
|---|---|
| Oficeja telefono: | 203 +768 4417 |
| Oficeja fakso: | 203 +768 5417 |
| Hejma telefono: | 203 +233 5463 |
| Hejma fakso: | 203 +768 54 35 |

## Pretiĝu jam por la aŭkcio!

Unu el la plej popularaj programeroj de la Kongreso estas la aŭkcio. Vi ĝuas la febran atmosferon de tiu spektaklo eĉ se vi ne sukcesos (aŭ ne intencas!) akiri tie ion por via biblioteko. Ĉi-foje la aŭkcio okazos ĵaŭde, inter la 16:00 kaj la 17:45 en la Salono Régulo. Gvidos ĝin la konataj virtuozuloj Tonkin kaj Wells.

En la aŭkcio oni proponos pli ol 50 rarajn librojn sed ankaŭ specialaĵojn kiel kongresano numero 1 en la U.K. en Seulo kaj libere elektebla numero en la sama Kongreso. Estos ankaŭ amuzaj surprizoj. Liston de aŭkcioataj libroj eblas ricevi en la Libro-Servo.

## Ekumena Diservo

Dimanĉe, 17:00, Urba Katedralo (*Plaza de la Reina*).

Plurnacia teamo de sacerdotoj diversreligiaj gvidos Komunan Ekumenan Diservon en la historiplena kaj mirinde bela Katedralo de Valencio.

De la Kongresejo, *Plaza de la Reina* atingeblas per busoj n-roj **4**, 6, 8, 9, 11, 16, 17, 36, 60 kaj 71(n-ro 4 plej taŭgas). La busoj ekiras de la haltejo kiu troviĝas en *Avinguda del Port* — la strato malantaŭ la hotelo *València Palace*.

## Atentu!

*Valencia Suno*, la Kongresa Kuriero de la 78-a U.K., tre tre danke akceptos viajn kunlaboraĵojn, raportojn, noticojn. Tamen, ne personajn anoncojn... Tiuj estas akcepteblaj nur kiel pagitaj reklamoj! (Petu preztabelon de la Konstanta Kongresa Sekretario.) Ĉetere, la redakcio rezervas al si la rajton, kurtigi, ŝaaĝi aŭ alimaniere rifuzi ies ajn kunlaboraĵon.


*Ĉi tie povus troviĝi via reklamo...*

Petu preztabelon de la Konstanta Kongresa Sekretario


**Urbestra akcepto: Lundon 13:30 en la urbodomo.**

La urbestro de Valencio, kui dekomence varme kaj entuziasme subtenis al kongreson, aranĝos specialan akcpeton por la delegacio de la Kongreso.

## Libro-Servo:

La Libro-Servo ekfunkciis sabaton je la 15:00 kun tre sukcesa vizitado de la kongresanoj. Ĝia fukciado okazos laŭ la horoj indikitaj en la Kongresa Libro. Ni atentigas ke dum la Kongreso aperos novaj titoloj: kaj lanĉoj de novaĵoj kaj elskatoligo de ankoraŭ ne eksponataj titoloj.

**'Aŭtoraj duonhoroj' en la Libro-Servo**

Dufoje ĉiutage, je la 12:00 kaj je la 17:30, ĉeestos en la Libro-Servo po unu aŭtoro kiu prezentos siajn lastajn verkojn. Oni antaŭvidas ĉeeston de Reza, prezentante sian *Leteroj el Japanio* kaj de Abel MONTAGUT, kiu lanĉos la monumentan sciencfikcian epopeon *Poemo de Utnoa*, kaj sian tradukon de poemaro de Ausias MARCH. Ĉeestos ankaŭ Eduard V. TVAROŽEK, el Slovakio (ankaŭ pseŭdonime konata kiel Vadmir GAZDA) kiu prezentos *Sola en Sunsubiro* krom ŝercojn kaj anekdotojn pri famaj homoj kaj Ĵak Le Puil, franco, redaktoro de *La Kancerkliniko*, kies kasedo *Ne donu* tro premieros ĉi-U.K.-e. Ankaŭ eblos konatiĝi kun HUZIMOTO Tatuo (konata kiel Fenestro), kiu reprezentos Ludovikiton kaj ties *Iam kompletigota plena verkaro de L. L. Zamenhof* kaj ankaŭ kun Mikelo Bronŝtejn kaj kun sia *Legendoj pri SEJM*, anekdotaro pri la esperanto-movado en la Breĵneva Rusio. Ankoraŭ ne konfirmita, sed antaŭvidebla estas la ĉeesto de Julius BALBIN kaj ties nova poemaro *Damnejoj*. En venonta numero ni precizigos pri la horo kaj dato de ĉiu prezento.

## Lastaj aniĝoj:

Kiam ni skribis tiujn vortojn estis jam aliĝintaj al la Kongreso 1773 homoj; tamen, pro manko de ebleco, ni listigas ĉi-sube ĝis la numero 1700. La ceterajn kaj la dume aniĝintajn ni listigos en venontajn numerojn.

| | | |
|---|---|---|
| 1666 | | S-ro Luis Otaola, Av da Reina Victoria 70, ES-28003 MADRID, Hispanio |
| 1667 | | Honorina Oliveira de Senna, Rua 25 de Dezembro 1530 ap.to 202, BR-79010-220 CAMPO GRANDE MS, Brazilo |
| 1668 | | Cristina Elias Méndez, Av.da Menéndez Pelayo 33, ES-????? VALÈNCIA (?), Hispanio |
| 1669 | afig-m | Ángel Figerola Auque, Victor de la Serna 19, ES-28016 MADRID, Hispanio |
| 1670 | padf-w | Marcelina Palomo de Figeurola, Victor de la Serna 19, ES-28016 MADRID, Hispanio |
| 1671 | | Szabó István, Kiserdo 37, HU-3700 KAZINCBACÍKA, Hungario |
| 1672 | | Szabó Istvánné, Kiserdö 37, HU-3700 KAZINCBACÍKA, Hungario |
| 1673 | hbsk-c | Klara Herbst, str. Kotoborozeska 13C m 32, PL-10-444 OLSZTYN, Polio |
| 1674 | grzm-w | Mariusz Grzelakowski, str. Piechockiego 12, PL-85-000 BYDGOSZCZ, Polio |
| 1675 | bjls-e | Edyta Białas, str. Wesoła 25, PL-??-??? BIAL/YSTOK, Polio |
| 1676 | | Renata Antonowicz, str. Pawia 30, PL-81-078 GDYNIA, Polio |
| 1677 | | Marlena Bernarska, str. Lotnicza 18/I/6, PL-82-300 ERBLA,G, Polio |
| 1678 | | Wojcieh Blecharz, str. Szpunara 7A/2, PL-81-185 GDYNIA, Polio |
| 1679 | | Edyta Dziapa, str. M. Curie-Skłodowskiej 35/21b, PL-85733 BYDGOSZCZ, Polio |
| 1680 | | Monika Głowacka, str. Swarzewska 58/45, PL-81-053 GDYNIA, Polio |
| 1681 | | Anna Grecza, str. Ks. Witolda 104/1, PL-85-509 BYDGOSZCZ, Polio |
| 1682 | | Katarzyna Horwat, str. Powst. Wlkp. 61/1, PL-85-090 BYDGOSZCZ, Polio |
| 1683 | | Agnieszka Imianowska, str. Wodna 5, PL-81-198 KOSAKOWO REWA, Polio |
| 1684 | | Anna Imianowska, str. Wodna 5, PL-81-198 KOSAKOWO REWA, Polio |
| 1686 | | Ewa Koftis, str. Kartuska 46/53, PL-81-002 GDYNIA, Polio |
| 1687 | | Ewa Krzysztof, str. Kartuska 46/53, PL-81-002 GDYNIA, Polio |
| 1688 | | Anna Kucharska, str. Polna 17, PL-??-??? RYPIN, Polio |
| 1689 | | Katarzyna Kucharska, str. Polna 17, PL-??-??? RYPIN, Polio |
| 1690 | | Barbara Labudda, str. Hetmańska 10, PL-??-??? GDYNIA, Polio |
| 1691 | | Aleksandra Maćkowiak, str. Sandomierska 29/44, PL-??-??? BYDGOSZCZ, Polio |
| 1692 | | Agata Marciniak, str. Piechokiego 14, PL-85-796 BYDGOSZCZ, Polio |
| 1693 | | Genowefa Markievicz, str. M. C.-Skl/odowskiej 10, PL-85-322 BYDGOSZCZ, Polio |
| 1694 | | Anna Mąkol, str. Markwata 20/27, PL-85-015 BYDGOSZCZ, Polio |
| 1695 | | Olivia Mąkol, str. Markwata 20/27, PL-85-015 BYDGOSZCZ, Polio |
| 1696 | | Patrycja Mąkol, str. Markwata 20/27, PL-85-015 BYDGOSZCZ, Polio |
| 1697 | | Wojciech Nowicz, str. Berlinga 2/51, PL-85-791 BYDGOSZCZ, Polio |
| 1698 | | Elżbieta Pawluk, str. Swarzewka 58/32, PL-??-??? GDYNIA, Polio |
| 1699 | | Agnieszka Stożyk, str. Chylonska 283/7, PL-??-??? GDYNIA, Polio |
| 1700 | | Kinga Świerczyńka, str. Konopnickiej 5/1, PL-85-124 BYDGOSZCZ, Polio |

**Vendprezo: 50 p-toj**

# VALENCIA SUNO

## 78a Universala Kongreso de Esperanto

Valencio, Palaco de la Muziko, 1993.07.24-31

**Lundon, la 26-a de julio** **Numero 2** **Vendprezo: 25 p-toj**


## Gravuloj salutas la Kongreson!

**Boutros Boutros GHALI, Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj**

«Mi ĝojas informi al vi la dankon de la Ĝenerala Sekretario al via letero de la 24 de oktobro, ĉar li ĉiam tre estimas ricevi informojn pri organizoj kiuj, kiel la via, promocias la celojn de la Unuiĝintaj Nacioj.

La Ĝenerala Sekretario instige laŭdas la laboron de la Universala Kongreso de Esperanto kiu, per siaj valoraj agadoj kaj komuna lingvo, provas kunigi la homojn de la tuta mondo por interŝanĝo de ideoj kaj krei etoson de komprenemo.

Ĉi-okaze li deziras gratuli ĉiujn partoprenantojn de la 78-a Universala Kongreso de Esperanto kaj esperas ke tiu estu plej sukcesa.

Estime via
Erik JENSEN»,
Direktoro kaj Vic-Ĝenerala Sekretario
Unuiĝintaj Nacioj

**Francisco MAYOR Zaragoza, Ĝenerala Sekretario de UNESKO**

«Estas kun granda plezuro, ke mi varme salutas partoprenantojn en la 78-a Universala Kongreso de Esperanto. UNESKO taksas aparte gravaj siajn rilatojn kun la neregistaraj organizaĵoj, kiuj reprezentas la mondan komunumon de pensuloj — inter ili UEA — tial ke ni dividas komunan vizion de pli bona kaj pli egaleca mondo, kaj ke la neregistaraj organizaĵoj estas la naturaj kunagantoj de UNESKO je ĉiuj niveloj, tutmonde kontinente kaj naciskale.

Speciale kontentiga por UNESKO estas via elekto de kongresa temo. Lastatempe UNESKO starigis internacian komisionon pri edukado por la 21-a jarcento, kiun prezidas S-ro Jacques DELORS. Sojle de nova jarmilo, ekzistas malmultaj pli gravaj taskoj ol la kreo de eduksistemo responda al la multoblaj kaj interligitaj de integriĝanta monda socio, inkluzive de la konsciigo pri la nepra neceso, ke la homoj lernu kunvivi en rondo familia kaj en ekvilibro kun la tera ekologio. Mi certas, ke viaj diskutoj, faros valoran kontribuon al tiu procezo kaj mi danke ricevus raporton pri via kongreso, kiun mi volonte disponigos al la Komisiono Delors.

Mi deziras al ĉiu partoprenantoj plej agrablan restadon en Valencio, kaj certigas vin, ke UNESKO alte taksas viajn klopodojn kunkonstrui tian mondon, en kiu la kultura diverseco ne malhelpas pli vastan unuecon pri la sorto de la Homaro.»

**Camilo José CELA, Nobel-premiito pri Literaturo**

«Kun tiom da respekto kiom da estimo, mi salutas la partoprenantojn de la 78-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazas en *València*, kaj al vi mi deziras la sukceson kiun vi meritas en via nobla celado provizi la mondon per komuna lingvo kiu povu garantii pacon kaj konkordon.

Tre kore,

Camilo José CELA»

**Papo Johano Paŭlo la 2-a**

«Lia Papa Moŝto sincere salutas la organizantojn kaj partoprenantojn de la 78-a Universala Kongreso de Esperanto okazanta en Valencio kaj ilin kuraĝigas daŭrigi sian tre estimindan klopodon por realigi mondon kie regu la interkompreniĝo kaj unueco.

Samtempe, Lia Papa Moŝto petas vin por ke tiu renkontiĝo de personoj el diversaj landoj, kulturoj kaj kredoj, parolantaj komunan lingvon, fariĝu atesto de la frateco kiu, sen ia ajn diskriminacio, devas regi inter ĉiuj homoj kiel membroj de la granda familio de la filoj de Dio; kaj por instigi personan kaj kolektivan kompromison konstrui la pacon en siaj opaj devenlokoj.

Per tiuj ĉi deziroj kaj alvokante la Dian protekton al la agadoj de la kongreso kaj al iliaj partoprenantoj, Lia Papa Moŝto plezuras disdoni la tre sopiratan Apostolan Benon.»

Nome de la Papo,
G.B. Re

**Jan KIENIEWICZ, ambasadoro de Pola Respubliko en Madrido**

«Estimataj gesinjoroj!

Mi transsendas mian plej korajn salutojn al la partoprenantoj de la Universala Kongreso de Esperanto. Samtempe mi deziras fruktodonajn debatojn pri la efektivigo de la ideo de komuna lingvo necesa por la tiom dividita nuntempe mondo.»


### Homoj!

Ne malkaptu vian ŝancon aĉeti unikan **T-ĈEMIZON** prezentantan la plej belan porjunularan revuon en esperanto: ***KONTAKTO***, haveblan ĉe la TEJO-giĉeto: 1000 pesetoj. Aĉetu tuj!

La **TEJO-giĉeto** funkcias en la halo ĉe la enirejo je la jenaj horoj: lundon 11:00-13:00 kaj 15:30-16:00; mardon 15:30-17:00; ĵaŭdon 10:00-12:00; vendredon 15:30-17:00.

Eblas pagi kotizon, fariĝi patrono aŭ gastiganto de ***Pasporta Servo*** aŭ aĉeti do la Kontakto-T-ĉemizon.

## Solena Malfermo

Ke la 78-a Universala Kongreso de Esperanto estos kongreso sen interpretistoj tion ni jam sciis antaŭ la inaŭguraj vortoj de John WELLS. Sed li rivelis por ni kroman karakterizon: la Valencia UK estas... la Paelja Kongreso. Ne nur ĉar sabate, en la interkona vespero, la bonŝanculoj manĝis gigantan paeljon, sed ankaŭ pro simileco profunda inter, unuflanke, la klopodoj de nia movado kaj aliflanke, la preparado de bona paeljo. «Vi ne sukcesos fari bonan paeljon kun nur kuniklaĵo kaj helikoj, des malpli per nur salo kaj akvo.», diris Wells. «Kiu volus, nome de iu 'pureco', uzi nur unu el la nepraj ingrediencoj, tiu fiaskus. La samon celas la Esperanta idealo: la popoloj formu unuecan tuton gardante sian identencon, fakte pro ĝi.»

Post tiu originala komparo, la prezidanto de UEA kelkvorte trakuris la historion de la tria plej granda urbo de Hispanio, kiu, por ĝiaj arabaj konkerintoj, nomiĝis 'urbo de ĝojo'. Dezirante ke tia ĝi fariĝu ankaŭ por la esperantistoj, John Wells martele-frape malfermis la kongreson. Sur la podio frontis la 2000-personan kongresanaron la estraro de UEA; la ĝenerala sekretario Simo MILOJEVIĆ, la estro de LKK, Augusto CASQUERO; la estro de Internacia Kongresa Universitato, Rafaela URUEÑO; la prezidanto de HEF, Antonio ALONSO Núñez; la prezidanto de TEJO, Saskia IZERDA; kaj la enkondukanto de la kongresa temo «Klerigo por la 21-a jarcento», Duncan CHARTERS.

Post la malfermo de Wells, salutis la kongresanojn Casquero, kiu emfazis: «la plej grava ero de la kongreso, kiel kutime, estos la koridoraj babiladoj kaj kafejaj konatiĝoj». Núñez atentigis pri grava atingo: laŭ lastatempa interkonsento kun la Hispana Ministerio pri Klerigo kaj Kulturo, ministeria observantino partoprenos la kongreson kaj verkos raporton.

Sekvis salutvortoj de du kongreslandaj aŭtoritatuloj: Parolis unue Jesús HUGUET, Ĝenerala Direktoro pri la Lingva Politiko de la Valencilanda Registaro, kun samtempa traduko Casquero, kaj sekvis s-ro Santiago CERVIÑO, Vicurbestro de Valencio kaj Skabeno pri Kulturo, kiu malbezonis ĉi-lastan ĉar li kapablis direkti afablan paroladeton en tute komprenebla, kvankam 'papaga', esperanto.

Prezentiĝis ankaŭ la listo de ĉi-jare elektitaj honoraj membroj de U.E.A.: S-roj Maertens, Bormann, Hernández Yzal, Nguyen, Nguyen, de Diego, Mandrik, Symoens kaj Hirsch.

Enkonduke al la kongresa temo, Prof. D-ro Duncan CHARTERS reliefigis en sia parolado la gravecon de nova aliro al la demando pri klerigo por la nova jarmilo, kiu permesus ke la novaj generacioj rompu la barilojn de la tradiciaj instruoj kaj eklernu mem pensi pri la vojo kiu kondukos al unueco de la Homaro, forĵetante la antaŭjuĝojn kiuj naskas konfliktojn kaj malpermesas la progreson. La esperantistoj mem devas konscii ke necesas ne nur influi la mondpenson favore al espeanto, sed maturigi la kondiĉojn kiuj permesos la alprenon de tiu solvo de la problemon de internacia komunikado.

Sekvis la salutvortoj de la prezidanto de TEJO, f-ino Saskia IZERDA, kiu alvokis la kongresanojn superi la generaciajn barojn, kaj tute konkrete helpi la junulojn de Esperantio — ties estontaj membroj kaj gvidantoj — per, i.a., patroniĝo kaj abono al *Kontakto*.

Poste salutis la kongreson reprezentantoj de la diversaj landoj: Unua salutanto estis Otto PRYTZ, kiu, laŭ postulo de la 'reĝisoro' Simo MILOJEVIĆ, povis eldiri tute senverban saluton, kiun sekvis reprezentantoj de Kubo, Pollando, Brazilo, Aŭstrio, Kolombio, Italio, Danio, Ĉinio, Francio, Slovenio, Svedio, Koreio, Angolo, Germanio, Aŭstralio, Hungario, Latvio, Svisio, Ukrainio, Israelo, Ĉeĥio, Slovakio, Pakistano, Irano, Portugalio, Rusio, Belgio, Estonio, Luksemburgio, Kostariko, Hispanio, Ĉilio, Britio, Venezuelo, Kroatio, Kanado, Irlando kaj Usono.

Malĉeestis la albana reprezentanto, kiu tamen ricevis aplaŭdojn, same kiel nekongresintaj esperantistoj el Bosnio, Kamboĝo, Haitio kaj eĉ Somalio, kies eventualaj esperantistoj certe bezonas nian apogon.

La malfermo finiĝis per solena stara kunkanto de *La Espero*.

## La Prezidanto enkondukas la salutantojn de landaj asocioj

Valencio estas konata pro tiu brila gastronomia inventaĵo, la paeljo. Hieraŭ vespere ni havis la eblecon konatiĝi kun ĝi en enormaj kvantoj. Kaj ĝi donis al mi ideon. La Esperanta idealo iom similas al paeljo. En la hieraŭa paeljo estis 400 kilogramoj da rizo, 50 kilogramoj da kokaĵo, 30 kilogramoj da kuniklaĵo, 5 kilogramoj da salikokoj, 10 kilogramoj da montaraj helikoj, mi ne scias kiom da kilogramoj da tomatoj kaj verdaĵoj, 5 litroj da olivoleo, kelkaj kilogramoj da salo, kelkaj gramoj da safrano, kaj 200 litroj da akvo. (Mi parolas rondcifere, laŭ memoro.) Per tiu amaso da diversaj ingrediencoj oni faris vere bongustan paeljon. Atentu, ke ne sufiĉus preni nur rizon, nek preni nur kuniklaĵon kaj safranon, nek preni nur helikojn kaj oleon. Per nur unu aŭ unu-du ingrediencoj oni ne ricevas bonan paeljon. Necesas kombini harmonie multajn diversajn elementojn por fari harmonian tuton.

Simile pri nia idealo. Al nia kongreso venis eble 10 mil kilogramoj da francoj, 25 mil kilogramoj da hispanoj, kvin mil kilogramoj da japanoj, mil kilogramoj da venezuelanoj, kelkaj gramoj da novzelandano, kaj certe mil litroj da britoj. Kaj multaj aliaj ingrediencoj, ĝis pli ol sesdek! Atentu, ke por fari belan mondon ne sufiĉas preni nur britojn kaj aŭstralianojn, nek preni nur francojn kaj japanojn, nek preni nur italojn kaj kroatojn. Necesas, ke amaso da diversaj ingrediencoj troviĝu kune en harmonia tuto.

Ve: montris la lastaj monatoj, ke en nia malfeliĉa mondo ne ĉiuj havas antaŭ si tiun nian idealon. Ni vidis, ke eĉ en Eŭropo ankoraŭ povas orgojle paradi tiu misformo de naciismo, tiu ŝovinismo, kiu volas malami ĉiujn, kiuj apartenas al alia grupo: kiu volas pravigi, ke oni pafu kontraŭ individuoj sur urbaj stratoj, ke oni ĵetu obuson en la mezon de futbal-ludantoj, ke oni sieĝu modernan urbegon ĝis mezepoka stato de mizero. Oni eĉ misuzas la nocion 'purigi', parolante pri 'etna purigado', por peli maljunulojn el siaj hejmoj kaj masakri virojn, virinojn kaj infanojn. Kun tia ŝovinismo ni volas havi nenion komunan. Ni protestas kontraŭ ĝi, sed ni kaj niaj politikistoj ne scias kion fari, por haltigi ĝin.

Do en nia Inaŭguro ni nun aŭskultos la salutojn de la diversaj landaj reprezentantoj. Tion farante, ni emfazas ne tion, kio nin disigas, sed tion, kio nin kunligas. Ni prezentas nin al ni. Kaj ni ĝojas pri la paelja riĉeco de lingvoj, etnoj, kulturoj, kaj religioj, kiujn ni reprezentas inter ni.

## La aŭtoraj duonhoroj komenciĝos lunde!

En la unua prezento, Stefan McGILL pretas alfronti sian legantaron kaj legontaron. Li verkis Tendaraj Tagoj (1, 2,... 3?) kaj multe pli. Rendevuo je 17:30 en la Libro-Servo.

## Komputiloj

Kunsido de fakgrupoj pri komputiloj okazos ĵaŭde en la salono Privat, je la 15:00. Ĉiu interesato estas invitata. La kunsido pritraktos la aktualajn temojn kiuj koncernas aplikadon de esperanto en la komputila fako. Organizanto estos Thomas GOLDMAN, kn 0579.

## Samseksamuloj

La jarkunveno de Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj okazos merkredon je la 19:00 ĉe la Centro Lambda, strato Sornells 26 (kunportu propran trinkaĵon). Eblas promeni de la kongresejo — renkontiĝu por **akurata** foriro je la 18:15.

Ĵaŭdon je la 18:00 en salono Privat la antaŭvidita temo **ne okazos.** Anstataŭe doktoro Helmut BRATH prelegos pri «Geja emancipiĝo — ĉu daŭra evoluo?»

## Eksterteranoj!

ScienFikciEmUloj kaj aliaj estaĵoj ĉiaplanedaj estas invitataj aniĝi al la nura interplaneda esperanto-organizo: Grupo NIFO. Freŝaj informoj troveblas ĉiam ĉirkaŭ la terano Miguel G. ADÚRIZ (kn 1763) aŭ en la ĵus aperinta *SFEROJ 8*, havebla en la Libro-Servo.

## Junuloj bezonataj!

Junuloj el plej diversaj landoj estas petataj ĉeesti la komenciĝon de la seminarieto pri la galega lingvo, hodiaŭ je la 16:00 en salono Popoviĉ. Temas pri tre grava afero, rilate al raporto (inkluzive fota) prezentota antaŭ ministeria decidonto pri oficiala apogo al preuniversitataj internaciaj kursoj en esperanto! (Post la unuaj kvin minutoj, neinteresatoj povos libere foriri.)

## Sangdonado

Esperantistojn ĉiam karakterizis solidareco kaj sindonemo. Ĉiujare dank' al sango-donoj saviĝas multaj vivoj. Hodiaŭ de 9:00 ĝis 13:00 kaj de 16:00 ĝis 19:00 vi havos la eblecon tion fari donante sangon. La tiucela loko estas indikata ĉe la enirejo.

## Koncertnuligo!

Ni informas ke, pro vizaj problemoj, la koncerto Bronŝtejn / Puhova, antaŭvidita por morgaŭ je la 12:00, ne povos realiĝi.

## Kunkreu la kurieron!

Petu en la redakcio de Valencia Suno (dekstre de la Libro-Servo) raportilon pri kongreseroj, pri kiuj vi volas aperigi noticon en la kongresa kuriero. Kunlaborantoj kiuj foje pretu tra- kaj al-kuri la ejojn de la kongreso re-ĉase de informoj, estas varme bonvenaj.

## Kvizo

Vendredon inter la 11:00 kaj la 12:45 en salono Régulo.

Kiel kutime en pluraj UK-oj, ankaŭ en Valencio okazos kvizo (t.e., demand-konkurso) pri la esperantaj movado, lingvo kaj literaturo. Serĉatas viglaj, spritaj, respondemaj kaj simpatiaj esperantistoj por ani en unu el la du teamoj. (Vidu paĝon 17 de la kongresa libro).

## Urugvajo revenas!

Kiel decido de la komitato oni reakceptis kiel landan asocion Urugvajan Esperanto-Societon, kies aneco ĉesis en 1974 pro ĝenerala paralizo de la tiulanda movado. Ĝia lastatempa reviglíĝo permesis subitan kaj salutindan kreskon, kiu pravigas tiun decidon.

## Kion fari en Valencio?

Se, en iu momento, neniu el la kurantaj programeroj logos vin (kio estas preskaŭ nekredebla!), jen okazo por esplori la nemovadan Valencion:

**Ekspozicioj**

IVAM - Institut Valencià de Art Moderna. Pentraĵoj de Maeviĉ, el la Rusa Muzeo de SanPeterburgo, kaj de Martial RAYSSE, unu el la iniciintoj de la franca novrealismo.

**Toreo, Valencia Foiro**

Ĉiuvespere, ĝis la 03:00 okazos toreado en la toreejo de strato Rerafa, apud la stacidomo. Monde diskutata kaj kritikata — ĉu arto? ĉu masakro? Vi povas iri mem kaj decidi.

La 30-an estos rajdtoreo, t.e., la toreisto rajdos ĉevalon.

## Internacia Kongresa Universitato

Hieraŭ je la 14:00 okazis la solena inaŭguro de IKU-sesioj, prezidate de doktoro John WELLS. Post prezento de la IKU-prelegontoj fare de d-rino Urueña, kiu parolis pri la temo «Klerigo por la 21-a jarcento en la internaciaj rilatoj», triflanken direktita: klerigo al la internacieco, al la toleremo kaj al la paco.

Je la 15:00 doktoro H. Maitzen el Aŭstrio, prelegis pri la interesa temo «Kosmo kaj tero — la ekologia rilato», elstarigante la evoluon de la koncepto mem pri la kosmaj fenomenoj kaj de la transcendeco por la Homaro. Per lumbildoj li prezentis diversajn aspektojn de tiuj fenomenoj, kaj asteroidojn, kiuj kaŭzis ekologiajn katastrofojn.

Nepre ne maltrafu la venontajn sesiojn de la Internacia Universitata Kongreso.

## Pola Radio raportas pri la Kongreso

La prikongresaj raportoj de la esperanto-redakcio de Pola Radio komenciĝis jam sabate per intervjuo kun la prezidanto de la L.K.K., Augusto CASQUERO de la Cruz. Ĉiutage la aŭskultantoj, kiuj ne povis veni al Valencio, ricevas koncizajn raportojn pri la trapaso de la kongreso kaj pli poste, dum la tutaj aŭgusto kaj septembro, en la semajnfinaj elsendoj vendrede kaj dimanĉe ja la 22:30 (mezonde 200 m = 1503 kHz) kaj ankaŭ vendrede kaj sabate je la 15:30 (kurtonde 31, 41 kaj 49 m) oni aŭdigos sonscenojn pri la kongreso kaj intervjuojn kun multaj kongresanoj. La prikongresajn pollingvajn raportojn en konciza formo perfakse ricevas ankaŭ la informcentro de la Pola Radio, kiun ĉiuj lokaj radiostacioj en Polio.

## Pretigo de Artaj Aranĝoj

La L.K.K.-ano pri Artaj Aranĝoj, Miguel FERNÁNDEZ, kontakteblas ĉiutage inter la 16:00 kaj la 18:00 en la ejo de la Gazetara Servo.

## Pago de la Kuriero

Enŝteliĝis eraro en la hieraŭa eldono: La prezo de la Kongresa Kuriero estas 25, ne 50 pesetoj, kaj konsiderenda kiel libervola donaco. Ĉiel ajn, **ĉiu kongresano rajtas je nur unu ekzemplero** kaj ni petegas ke oni portu do nur unu, por ke la eldonkavto sufiĉu por ĉiuj.

# Novaj aniĝoj:

Jen listero ĵus veninta el Rotterdam kun la kongresanoj n-roj 1640-1665, aliĝintaj jam post la redakto-fono de la kongresa Libro sed ankoraŭ traktitaj en la Centra Oficejo:

1640 Lilly Davanger, Jonsvoldsgt. 5, NO-5011 Bergeni, Norvegio
1641 Steinar Fitjar, NO-5240 Valestrandsfossen, Norvegio
1642 Pilar Menendez, Postboks 32, Novseter, NO-0705 Oslo, Norvegio
1643 Otto Prytz, Postboks 32, Hovseter, NO-0705 Oslo, Norvegio
1644 Krystyna Babiarz, ul. Szenwalda 13/6, PL-81 462 Gdynia, Pollando
1645 Aiko Baba, 1-16-16 Josuinhoncho, Kodaira-shi, Tokyo, Japanio
1646 Kazumi Goto, 3-20-10-407 Honhaneda Ota-ku, Tokyo, Japanio
1647 Luís de Otaola Fao{'n, Amadeo Deprit, 5-7, CES-48006 Bilbao, Hispanio
1648 Božena Vychodil, Zandovska 304, CEK-19031 Praha 9, Ĉeĥio
1649 Jiři Vychodil, Zandovska 304, CEK-19301 Praha 9, Ĉeĥio
1650 Barbara Grgurević, ul.Djure Strugara 32, HR-51000 Rijeka, Kroatio
1651 Robert Holjevac, ul. Zvonimira Rogoza 5, HR-41000 Zagreb, Kroatio
1652 Josipa Katunar, Stube Andjelovića 4/IV, HR-51000 Rijeka, Kroatio
1653 Florin Hurducas, 13-17, Moldevei st., RO-4800 Baia Mare Maramures Rumanio
1654 Janina Pilger-Bugaj, Leekerhoek 26, NL-8223 ZS Lelystad, Nederlando
1655 Michel Pilger, Leekerhoek 26, NL-8223 ZS Lelystad, Nederlando
1656 Wouter Pilger, Leekerhoek 26, NL-8223 ZS Lelystad, Nederlando
1657 Hirosi Sato, 1-2-8 Koenjiminami, Suginamiku, Tokyo, Japanio
1658 Mau{'ro La Torre, Viale Bardanzellu 117, IT-00155 Roma, Italio
1659 Byunghoon Rhee, Inhu-l-ga, Inhu-Hyondai Apt. 104 dong 203 ho, Chonju-si, 560 231, Korea Resp.
1660 Heinz Muhsal, An der Beeke 33, DE-47443 Moers 1, Germanio,
1661 Ivo Miesen, H. Cleyndertweg 41, NL-1025 DG Amsterdam, Nederlando,
1662 Werner Heinrich, Guineastr. 36, DE-13351 Berlin 65, Germanio
1663 Julia Castiau Terheidjehoek 14, BE-3221 Nieuwrode, Belgio
1664 Georgina Almanza, Kuba E-Asocio, Apartado postal 5120, CU-10500 La Habana
1665 David Alvéstegui Rodri{'guez, El Ancla 4966, Villa Frei, CL- Santiago 11 Ĉilio

Kaj jen la daŭrigo de la listo de la surlokaj aniĝintoj:

1701 Anna Terlecka, str. Ku Wiatrakom 11/77, PL-85-856 BYDGOSZCZ, Polio
1702 Ma-gorzata Winiarska, str. Po-czyńska 2/184, PL-85-711 BYDGOSZCZ, Polio
1703 Anna Zawiślak, str. Czarckieho 3/11, PL-85-138 BYDGOSZCZ, Polio
1704 Joanna Żmudzka, str. Ba-kan'ska 6/59, PL-??-??? BYDGOSZCZ, Polio
1705 Hilde Gjøer, Ånasrudtoppen 16A, NO-1370 ASKER, Norvegio
1706 Adamo Sánchez Hervas, Sardañola 18-3-5, ES-08190 SANTCUGAT, Hispanio
1707 Arnald Massanas i Daunis, Güell 178-6-3, ES-17005 GIRONA, Katalunio
1708 Olga Madrigal Palacio, Avda. Doctor Tomás Sala 47-20, ES-46017 VALENCIA, Hispanio
1709 Antono Madrigal Sáez, Avda. Doctor Tomás Sala 47-20, ES-46017 VALENCIA, Hispanio
1710 Antonio Verdú, Mariano Benlliure 84, ES-????? ELCHE, Hispanio
1711 Joxemari Sarasua, Abaro estarta 13-5-esk., ES-48013 BILBAO, Hispanio
1712 Antoni Badia Planes, Bisbe Meseguer 18-1-3, ES-????? ?, Hispanio
1713 Salvador España Boquera, Echegaray 5-2, ES-46??? CARCAIXENT, Hispanio
1714 Eolyta Bia-as, Wesota 25 m 15, PL-15-307 BIA-YSTOK, Pollando
1715 Manuel José Pinguinha, Póvoa de Sinde, PT-3420 TÁBUA, Portugalio
1717 Girts Drake, Strelnieku 7-1A, LV-226010 RĪGA, Latvio
1718 Joan Marimon, Pere Martell 29-4t, ES-43005 TARRAGONA, Katalunio
1719 Alicia Marimon, Pere Martell 29-4t, ES-43005 TARRAGONA, Katalunio
1720 Ariadna Marimon, Pere Martell 29-4t, ES-43005 TARRAGONA, Katalunio
1721 Yu Sailing, 917-404 Zhongguancum, CN-100086 BEIJING, Ĉinio
1722 Vasil Stanoviĉ, Lviv obl. ul. Genĉarska 4, UA-293720 DROGOBYĈ,Ukrainio
1723 Josep Martorell Aulet, Cartagena 353/355-1-3, ES-08??? BARCELONA, Hispanio
1724 Carles Berga i Molina, Plaça del mercat 10-1-1, ES-08018 BARCELONA, Hispanio
1725 Aleksandro Kogan, kesto 130, RU-197022 SANKT-PETERSBURGO, Rusio

# VALENCIA SUNO

## 78a Universala Kongreso de Esperanto

Valencio, Palaco de la Muziko, 1993.07.24-31

**Mardon, la 27-a de julio** **Numero 3** **Vendprezo: 25 p-toj**


### Rezultoj de la Belartaj Konkursoj

**Poezio:**

**1-a premio:** Georgo Kamaĉo (Hispanio) pro *Monologo kun Mediteraneo*.

**2-a premio:** Miguel Fernández (Hispanio) pro *Iama am' aŭ sonĝo ĉiunokta*.

**3-a premio:** Gonçalo Neves (Portugalio) pro *Metropulo*.

**Honora mencio:** Gonçalo Neves (Portugalio) pro *Lavistino fonta* kaj Miguel Fernández pro *Poeto*.

Partoprenis 57 verkoj de 20 aŭtoroj el 19 landoj.

**Prozo:**

**1-a premio:** Miguel Fernández (Hispanio) pro *Ek al barikadoj!*.

**2-a premio:** Liven Dek (Hispanio) pro *Semo*.

**3-a premio:** Gonçalo Neves (Portugalio) pro *Jozefo*.

**Honora mencio:** Miguel Fernández pro *Esencen persense*.

Partoprenis 25 verkoj de 13 aŭtoroj el 10 landoj.

**Teatraĵo:**

**1-a premio:** ne aliĝita.

**2-a premio:** Sten Johansson (Svedio) pro *Savboato*.

**3-a premio:** Stefan McGill (Hungario) pro *Konvena Rezulto*.

**Honora mencio:** Abel Montagut (Katalunio) pro *Don Kiĥoto eksterlande* kaj Sten Johansson pro *Heliko — aŭ podia diskuto pri la lingva evoluo de esperanto*.

Partoprenis 4 verkoj de 3 aŭtoroj el 3 landoj.

**Eseo:**

**Premio Luigi Minnaja:** ne aljuĝita.

**Honora mencio:** Waldek Pastuszka (Polio) pro *Problemoj kaj eblecoj de ŝaradtaska kreado en esperanta lingvo*.

Partoprenis 4 verkoj de 4 aŭtoroj el 4 landoj.

**Premio An-okin pri kanto:** Flávio Fonseca (Brazilo) pro *Babelturo* kaj Miguel Fernández, teksto, kaj Pedro Vilarroig, muziko, (Hispanio) pro la kantoj *Amtemo* kaj *Tarde*.

Partoprenis 9 kantoj de 5 aŭtoroj aŭ aŭtoraj duopoj el 5 landoj.

**Premio nova talento:** ne aljuĝita.

**Premio Infanlibro de la jaro 1992:** *Tiel do. Rakontoj por malgrandaj infanoj* de Rudyard Kipling; tradukita el la angla de Wouter F. Pilger. Eldonita de Vulpo-Libroj, Lelystad (Nederlando).

Partoprenis 2 libroj de 2 eldonejoj el 2 landoj.

**Fotografio kaj vidbendo:** Anoncotaj en la Solena Fermo.

## Partopreneblis...

### Internacia Kongresa Universitato

Lunde matene la prestiĝa kaj konata verkistino d-rino Marjorie BOULTON (kn 467) prelege aprezis la vivon de nia forpasinta Juan RÉGULO Pérez. En Kanario li dediĉis 'regule' 4 horojn el ĉiu tago al la eldonado de esperantaj libroj kaj laboro pri la zamenhofa stilo. Li eraris nur en sia tro malalta takso de la propraj verkaĵoj.

Vespere, d-ro Duncan CHARTERS prelegis pri la tre interesa temo «Kiel karakterizi la kulturon kaj literaturon de la hispanoj?» montrante per diversepokaj verkoj hispanaj, la kunfandiĝon de diversaj etnaj kaj religiaj kulturoj, kaj la valorajn universalajn perspektivojn pri la digno kaj honoro de la individuo: Cervantes kaj Calderón de la Barca montras, per siaj verkoj, la plej altajn aspirojn de la homa spirito.

### Katolikoj

En la hieraŭa jarkunveno de IKUE vicprezidanto sac. KÓBOR Lajos raportis pri la ekumena kongreso en Viviers (FR); la venonta okazos en Gostyin' (PL). Estis prelego pri la neceso de esperanto en la katolika eklezio kaj aprobiĝis decido sendi danktelegramon al la Papo pro la bondeziroj kaj benoj senditaj de li al la UK.

### Medicinista kunveno

En la jarkunveno de UMEA, la ĉeestantoj aŭskultis la raporton de d-ro Ferenczy pri la lastjara agado de las asocio. Ĉefa tasko estis plifortigi la internaciajn kontaktojn kun la Monda Organizo de Sano. UMEA okazigis antaŭ kelkaj semajnoj la 9-an Internacian Medicinan Esperanto-Konferencon en la urbo Veszprém (Hungario) kun 70 partoprenantoj el 14 landoj. Okazis 20 fakaj prelegoj kaj vizito al sanatorio de kormalsanuloj.

La ĉi-jaran UMEA-Shinoda-Premion ricevis d-ro A. Vaitilavičius (Litovio) pro sia elstara scienca agado per esperanto.

Laŭ skriba voĉdonado oni elektis la estraron de UMEA por la sekvontaj tri jaroj: prezidanto, d-ro Imre FERENCZY (HU); vicprezidanto, prof. d-ro Kiril POPOV (BG); ĝenerala sekretario d-ro Vladimiro OPOILA (PL); sekretario, d-ro Arja KUHANEN (SF); kasisto prof. d-ro YAMAZOE Saburo (JP).

### Movado sen nomo

Hieraŭ okazis la kunveno de kaj pri Movado sen Nomo. Ne eblas en kelkaj linioj klarigi, kio kaŝiĝas malantaŭ tiu ĉi mistera nomo. Sed dum la tuta kongresa semajno informa budo funkcios en la kelo de la kongresejo, kie dejorantoj volonte havigos klarigojn pri la senco kaj agadoj de tiu ĉi movado.

## Ankaŭ partopreneblis...

**Fakkunveno pri etnismo**

La IKEL-fakkunvenon pri romaoj (ciganoj) enkondukis la IKEL-prezidanto per skizo de la historio kaj nuna situacio de la romaoj en la mondo (inter 17 kaj 33 milionoj, precipe en Eŭropo, Usono kaj Azio). Li atentigis pri tio, ke la romaa lingvo (konsistanta el fasko da dialektoj diversgrade parencaj inter si) estas hindeŭropaj (hindia branĉo), kaj ke ĝi plej zorge parolatas en suda kaj sudorienta Eŭropo; en Hispanio kaj Portugalio la romaoj apenaŭ parolas sian etnolingvon. De post la unua internacia romaa renkontiĝo en 1878 en Bad Cannstatt (Germanio), la romaoj pli kaj pli firmigis la konscion pri sia etno kaj klopodas batali kontraŭ la diskriminaciado flanke de la pajoj (= neromaoj). La kvara monda romaa kongreso (Varsovio, 1990) i.a. akceptis unuecan alfabeton por la romaa lingvo kaj, helpe de la Eŭropa Komunumo, romaaj lingvikistoj laboras por ties normigo.

En la posta vigla diskutado estis akcentita la graveco forigi antaŭjuĝojn kontraŭ romaoj kaj prezenti la kulturajn valorojn romaajn. Oni insistis pri la neceso agnoski la romaojn kiel etnan grupon (minoritaton) senteritorian. Tion ĉi akcepetis la partoprenantoj en formo de rezolucio direktita al la registaroj de la koncernaj ŝtatoj.

**Esperanto-veterana kunsido**

Hieraŭ je la 09:00, nur 3 homoj partoprenis la kunvenon de Veterana Esperanto-Klubo, VEK (!). Ĉu eble la matena horo estis tro frua por la veteranoj? La prezidanto s-rino Julie WINTER bedaŭrinde ne povis ĉeesti la kongreson kaj oni nur iom babilis.

**Ekumena kristana kunveno**

La prezidanto de Kristana Esperanto-Ligo Internacia, pastoro Adolf BURKHARDT (kn 807) kaj ties estraranino FARKAS-TATÁR Éva, priskribis la rezulton de du arangoj, kie ili kunlaboris. Interalie, IKUE kaj KELI kundiskutis la organizadon de la 10-a Ekumena Esperanto-Kongreso. Ĉeestis la kunsidon ĉirkaŭ 40 kongresanoj.

**Ekonomikista kunlaboro**

En la hieraŭa jarkunveno de IKEF (Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo) okazis diversaj paroladoj kiuj emfazis la fakton, ke esperanto povas esti ponto-lingvo en komercaj rilatadoj inter diversaj nacioj. Ĉefe nun en multaj landoj okazas gravaj sociaj kaj ekonomiaj ŝanĝoj, kaj multaj personoj, ankaŭ privatc, estas pretaj komerci kun aliaj landoj. La esperantistoj povas profiti sian internacian lingvon por tio. Diverslandaj prelegantoj raportis pri tre kuraĝigaj eblecoj sur tiu ĉi kampo kun konkretaj atingoj en Ĉinio, Litovio, Usono, Bulgario k.a.

## Unua koncerto de Solo

Eduardo VARGAS 'Solo' estas andaluza muzikisto kiu jam koncertis plurfoje en Esperanto-aranĝoj. Ĉi-foje li prezentis sin per pli instrumenta aranĝo ol kutime — eble ĵaŭdon ni havos la eblecon reaŭskulti pli el lia ĝis nun nura disko.

Eduardo VARGAS uzante sintezile registritajn ritmojn kreas nekutiman muzikan etoson, kiun oni nomus nek roka, nek popa, nek klasika. Dum unu horo, per siaj voĉo kaj sintezilo, Solo kreis novan sonmondon kune kun 200 ĉeestantoj — de sovaĝa ritmo al sonorila etoso. La muziko estis ofte kiel bela teksaĵo de sonoj, kaj la artisto ankaŭ multe esprimis per la korpa movado.

Li komencis la koncerton per la ege konata *Bolero* de M. Ravel, kaj li atingis sufiĉe dignan elektro-version. Poste li sin turnis al pli arab- aŭ ital-stilspecaj kantoj, kies tekstoj foje ne estas facile kompreneblaj — eble sian andaluzan akĉenton li ankoraŭ ne sufiĉe forprenis dum la esperantlingva kantado. Li apoteoze finis per sintezila kantado de poemo de Miguel FERNÁNDEZ, en sentfrapiga kaj filmeca sinsekvo de ritmoj. La publiko respondis kun granda aplaŭdo kaj la belaj sonoj restis profunde en ĝiaj oreloj.

Muzikŝatantoj ne maltrafu la venontan koncerton de Solo, ĵaŭde je la 16:00 en la salono Zamenhof.

## Dimanĉa Ekumena Diservo en la Granda Katedralo: raporto

Unue oni ekzercis la uzotajn kantojn kun helpo de la katedrala orgenisto: preparis la Diservon s-ro Juan GIMÉNEZ (organizo) kaj pastro KÓBOR Lajos, vicprezidanto de KELI kaj pastoro Adolf BURKHARDT, luterano — supozeble la unua prediko de ano el reformacia eklezio iam farita en tiu preĝejo. Li atentigis pri la celo de klerigo por la 21-a jarcento: paco kun justeco kaj integra konservado de la kreita mondo. Pacon kaj repaciĝon li ilustris per la fino de la Biblia historio (Joël THÉZARD verkis kaj publikigis ĝin en esperanto — *La bela historio pri Jozef*), kie Jozef definitive repaciĝas kun siaj fratoj. La vorto "Dio" apenaŭ aperas en la longa teksto (Gen. 37-50), sed ĝuste en la normalaj kaj homaj, eĉ tro homaj, agoj kaj misagoj Li kaŝiĝas kaj tiel Li ebligas vivon. La tuj sekvan eŭkaristion prezidis Kóbor kaj pastro Musazi el Vatikana Radio. Kulmine oni legis la salutan mesaĝon de la Papo Johano la 2-a.

## Milita Taglibro

En koŝmaraj vivkondiĉoj daŭre luktas kontraŭ la absurdo kuraĝaj homoj kiaj Zlatko DIZDAREVIĆ, unu el la responsuloj de Oslobodjenje, la sola senĉese aperinta sendependa ĵurnalo en Bosnio kaj Hercevogino, en kiu Serboj, Kroatoj kaj Islamanoj, kun plej profesia konscienco ĉiutage laboras por diskonigi veraĵojn.

*Milita Taglibro*, de Zlatko DIZDAREVIĆ aperis unue felietone kaj nun libro-forme, ankaŭ en esperantlingva versio. La 80-paĝa verko akireblas ĉe la kongresano Ĵak le Puil, kontraŭ 60 FRF.

## Kanto pri Valencio en esperanto.

Konata varsovia baritonulo Remigiusz KOSSAKOWSKI surbendigis esperantlingvan kanton pri Valencio, kiun la esperanto-redakcio de Pola Radio ĉiutage uzas kiel signalon de la prikongresaj raportoj. En la rektaj pertelefonaj raportoj pri la kongreso, partoprenis, inter aliaj, profesoro John WELLS, profesoro Duncan CHARTERS, Gian Carlo FIGHIERA kaj Augusto CASQUERO. La centra informfako de Pola Radio ankaŭ informis pri la kongreso kaj pri ties ĉeftemo.

Atenton! La **renkontiĝo de aŭskultantoj de** Pola Radio kaj aliaj **radiostacioj uzantaj esperanton** okazos vendrede je la 18:00 en salono Popoviĉ. Unu el la temoj estos kunlaboro inter la radiostacioj utiligantaj esperanton.

## Nemaltrafindos:

**Infanaro**

Hodiaŭ je la 12:00 venos en la kongresejon la esperanto-infanaro partoprenanta la 28-an Internacian Infanan Kongreseton. Niaj plej junaj homoj kantos por ni — venu kuraĝigi ilin kaj apogi la infanan kongreseton!

**Teatro**

La junurala teatro Studio 'P' el Toruń, Polio, grupo kun multjara tradicio, prezentas programojn pri la homaj sopiroj, ĝojoj kaj maltrankvilojn. Studio 'P' fakiĝis pri nuntempa literaturo. Dum sia pli ol 20-jara ekzistado estis multfoje premiita kaj prezentita en radio kaj TV. Ekde 1979 ĝi prezentas ankaŭ esperant-lingvajn teatraĵojn, el kiuj plej rimarkindas la spektaklo *Kiun ajn nomon vi havas*, teme pri Jeanne d'Arc, kaj *Sinjoro Tadeo*, la fama pola epopeo. Dum la UK Studio 'P' prezentos la novan programon *Haltigu la tempon*, kompilitan el tekstoj de nuntempaj polaj aŭtoroj, kiu estos prezentita dum la Internacia Scenejo vendrede je la 11:00 en salono Zamenhof.

**Spiritistoj**

Brazila Spiritisma Federacio invitas la ĉeesti en Salono Privat ĵaŭde je la 16:00. La prelego estos bazita sur la libro *La ĉielo kaj la infero*, kiun oni senpage disdonos al la ĉeestantoj.

## Programŝanĝo

La kunsido de **'Esperanto' Radikala Asocio** okazos vendredon je la 12:00 en salono Régulo, do ne mardo kiel anoncite en la Kongresa Libro.

## Libro-Servo

**Aŭtoraj duonhoroj**

Je la 12:00, Zlatko TIŠLJAR prezentos la gravajn problemojn de la vivo — aŭ fakte sian libron *Duobla Spiralo*, kiu temas pri ili.

Ĵak le Puil, fama bardo kun barbo, jen revenas li kun sia nova kasedo *Ne donu tro*, renkontebla dum ora duonhoro (17:30-18:00) en la Libro-Servo.

**Nova kasedo el Israelo**

Ĵus aperis la kasedo *Israelo ne ĉesas kanti*, kiu sekvas kaj kompletigas la antaŭan *Israelo kantas*. Estas tute nova eldono de 20 israelaj kaj jidaj kantoj, plej popularaj kaj reprezentantaj diversajn stilojn, en plenumo de la profesia kantistino Tova BEN-CVI. La kasedon akompanas tekstkajero.

## El la travivaĵoj de fremdlanda kongresano

Multajn jarojn mi dediĉis junaĝe por lerni internaciajn lingvojn — la anglan, la francan kaj eĉ esperanton. Sed alveninte Hispanion antaŭ tri tagoj mi malkovris, ke mi vane penis — ĉar la veran internacian lingvon mi forgesis lerni. Temas komprenebIe pri la hispana. Ĉar turisto (eĉ se li estas esperantisto) ĉi tie devas nepre regi ĉi tiun lingvon por ne perdiĝi — aŭtobuse, taksie, restoracie kaj eĉ... en la studentaj loĝejoj kaj... en la kongresejo mem... pri la angla, la franca, ktp. la valencianoj ankoraŭ ne aŭdis.

(Sekve de tio mi decidis komenci lerni la korean lingvon tuj post mia reveno hejmen.)

*¡Adiós! ¡Hasta la vista! Yo no hablo español.*

Josef Ŝemer (kn 1063), Israelo

## Internaciaj familoj

UNO proklamis la jaron 1994 La Jaro de la Familio kaj U.E.A. decidis dediĉi al ĝi Internacian Simpozion «Internacia Familio — utopio aŭ realeco?», kiu okazos inter la 7-a kaj la 10-a de julio 1994 en la aŭstra urbo Graz, kaj kies praktikan organizon plenumos Interkulturo en Maribor.

La simpozio traktos referaĵojn de fakuloj pri miksitaj familioj el diversaj vidpunktoj kun la ĉefa celo esplori ĉu internacie miksita familio, plej ofte du- aŭ tri-lingva edukas la infanojn tiel, ke ili estu malpli influeblaj de ekstremaj naciaj kaj religiaj ideologioj, do pli kapablaj aktivi por la paca mondo de la 21-a jarcento. Unu el la sekcioj traktos esperantistajn familiojn en kiuj oni edukas la infanojn en esperanto. La laborlingvoj estos ĉiuj lingvoj de la partoprenantoj sed la tradukon oni prizorgos nur al esperanto. Tio signifas, ke al la simpozio povos aliĝi kiu ajn neesperantista fakulo kaj referi kaj diskuti en sia lingvo. La referantoj ne pagas kotizon. Aliaj pagas aliĝ-kotizon de 250 ŝilingoj (40 guldenoj). Petu detalajn informojn ĉe Interkulturo, Kočevarjeva 12, SLO-62000 MARIBOR, Slovenio; faks. +38 +62 +221371.

**La komisiono de UEA pri La Jaro de la Familio kunsidos ĵaŭdon je la 12:45 en la salono Cseh.**

**Vojaĝo al Vraca!**

Al tiuj, kiuj deziras partopreni en la **IJK en Vraca**, kaj interesiĝus pri ekskurso en Rumanio kaj Bulgario tiurilate: **Ionel ONEŢ** estros grupon tian, kaj pretas helpi kelkajn plurajn. Venu al neformala kuniĝo por detaloj ĵaŭdon je 13-a horo apud ĉambro Lapenna kie Lusi Harmon de Esperanto-Vojaĝservo klarigos.

## Novaj aniĝoj:

| | | |
|---|---|---|
| 1726 | rdjr-d | Jiří Rada, Rybalkova 1029 bl. 645, CS-43401 MOST, Ĉeĥio |
| 1727 | | Nidal Hazboun, P.O. Box 6465, TRIPOLI, Libio |
| 1728 | | Živilė Maruškaitė, Šermukšniy 12-1, PASVALYS, Litovio |
| 1729 | | Mārtiņš Tidens, Siguldas 25-43, LV-3400 LIEPĀJA, Latvio |
| 1730 | | José Ricardo Toscano, R. Francisco Baia 10-7-esq, PT-1500 LISBONO, Portugalio |
| 1731 | | Luis Salag Laguarda, San Antonio 70, ES-46??? MISLATA, Hispanio |
| 1732 | luen-c | Leonardo Luenda, Palanka Esperanto-Klubo, Caixa Postal 1132, LUANDA, Angolo |
| 1733 | | Sowata Kazokevičienė, Kosmonautų 15-7, LT-???? KEDAINIAI, Litovio |
| 1734 | | Alfredas Endriulaitis, pk 50, LT-5250 PASVALYS, Litovio |
| 1735 | | Rasa Gelčyte, Viniu 9-1, LT-???? KALINAS, Litovio |
| 1736 | | Matas Petrulionis, Dariaus Ir Girėno, LT-???? GARGŽDAI, Litovio |
| 1737 | | Rasa Zurbaite, Žvemaites 12, LT-3005 KAUNAS, Litovio |
| 1738 | | Karlo Musazzi, Via Pietro Roselli 6, IT-????? ??, Italio |
| 1739 | | Nuria Pérez Pérez-Romero, Avda. Juan Carlos I ??, ES-????? MURCIA, Hispanio |

1740 Patricia Pérez Pérez-Romero, Avda. Juan Carlos I ??, ES-????? MURCIA, Hispanio
1741 Tlgis Jakubauskas, Tūšros 49-1, LIT-233005 KAUNAS, Litovio
1742 Francisco Marco Máñez, Quart 74-7, ES-46??? VALENCIA, Hispanio
1743 Sveta Gončarova, ??, RU-??, Rusio
1744 Ursula Richter, Usinger Str. 7, DE-65719 HOTHEIM A. TS., Germanio
1745 olwa-s Oliver Walz, pf 2019, DE-66470 ZWEIBRÜCKEN, Germanio
1746 Andrea Ivnik, Sevilla 10-2, ES-43001 TARRAGONA, Kroatio
1747 Con Pakis, 57 Rathmullen QD, DONCASTER, Victoria, Aŭstralio
1748 Lluis Armadans, PL Sagrada Familia 4-4, ES-08013 BARCELONA, Hispanio
1749 Cezaro García, Pedregal 12-7-H, ES-33400 AVILÉS, Hispanio
1750 Šarūnas Zubrickas, Respublikos 24-19, LT-???? KEDAINIAI, Litovio
1752 Xosé Lourenzo Vidal, Restollal 43-3-D, ES-????? SANTIAGO DE COMPOSTELA, Hispanio
1753 Paulus Ĵaluda, Zaisves Aleja 104-15, LT-???? KAUNAS, Litovio
1754 Ottmar Jareb, Blücherstr. 42, DE-71116 GÄRTINGEN, Germanio
1755 Julián Herrero, Blas Vila 25, ES-46980 PATERNA, Hispanio
1756 Eulogio José Monferrer Solsona, Juan Ramón Jiménez 17-6-22, ES-????? ??, Hispanio
1757 Agnieszka Gawinecka, ??, PL-??-??? BYDGOSZCZ, Polio
1758 Joanna Benedict, Mjejskiego 64/117, PL-??-??? BYDGOSZCZ, Polio
1759 Karolina Okonek, str. M. c. Skłodowskiej 96/13, PL-??-??? BYDGOSZCZ, Polio
1760 Szymon Grecza, ul. Ks Witolda 104, PL-85-507 BYDGOSZCZ, Polio
1761 Pedro Ullate López, Los Coteros 16-2-I, ES-39600 MURIEDAS, Hispanio
1762 saph-k Arleta Phillips, 84 Mount Road, Hastings, GB-TN35-5LA Britio
1763 migu-v Miguel Gutiérrez Adúriz, Los Coteros 1C-2I, ES-39600 MURIEDAS, Hispanio
1764 ersz-p Isabel Renovell Sanz, Avda. San Onofre 33-15, ES-46??? ??, Hispanio
1765 Lidmila Bohovicová, Štefánikova 1089, CZ-530 02 PARDUBICE, C^eh^io
1766 Francisco Ramirez, ??, Hispanio
1767 Arūnas Žabaliūnas, Daukšos 18-8, LT-3000 KAUNAS, Litovio
1768 Zuzana Ďvuricova, Budovateĺská 17, SQ-058 01 POPRAD, Slovakio
1769 Ivo Miesen, M. Cleyndentweg 41, NL-1025 DY AMSTERDAM, Nederlando
1770 Tali Wandel, D.N. Modi'im, IL-????? MAKABIM, Israelo
1771 Máriam Sarrio Múñoz, PL Benedito 3, ES-46??? XATIVA, Hispanio
1772 Alžbeta Branišová, Slanec 230, SQ-044-17 ??, Slovakio
1773 Algimamtas Petruliomis, Kramto Aleja 52-9, LT-2300 ??, Litovio
1774 ammi-r Amálie Miluchová, ??, CZ-735-14 ??, Ĉeĥio
1775 Edmea Rocha Miranda, Av. Atlântica 900/903, BR-????? LEME RJ, Brazilo
1776 Tóth Balázs, Somlói u. 47/c, HU-1118 BUDAPEST, Hungario
1777 sogh-e Francis Soghomonian, 39 rue des Grottes, FR-94440 VILLECRESNES, Francio
1778 evfr-? Farkas-Tatár Eva, Dohány u. 36, HU-1077 BUDAPEST, Hungario
1779 Agata Oleksowicz, Łyskowskiego 25A/17, PL-87-100 TORUŃ, Polio
1780 Małgorzata Szczerbowska, Bażyńskich 38/10, PL-87-100 TORUŃ, Polio
1781? Danica Phillips, 84 Mount Road, Hastings, GB-TN35-5LA Britio
1781? Sheila Mackenzie-Wintle, 15 Balmain Close, Grange Road, Ealing, London, Britio
1782 Guillaume Terris, Canterate, FR-09600 MONTBEL, Francio
1783 Edith Bombrum, 104 Route de Grenet, FR-42170 ST JUST ST RAMBERT, Francio
1784 Guilhem Garrigues, FR-09600 LIMBRASSAC, Francio
1785 Marseta Badaličeva, Zriniskiega 5, SLO-61000 LJUBLJANA,Slovenio
1786 Algimantas Jakštas, Taikos pr. 25-17, LT-5802 KLAIPEDA, Litovio
1787 Ángel Figuerola Aute, Víctor de la Serna 19-7°-izq., ES-28??? MADRID, Hispanio
1788 Marcelina Palomo Herrero, Víctor de la Serna 19-7°-izq., ES-28??? MADRID, Hispanio
1789 Elżbieta Kończalska, Wybickiego 22, PL-??-??? TORUŃ, Polio
1790 Mª Candelas Durán Fernández, Los Coteros 1C-2I, ES-39600 MURIEDAS, Hispanio
1791 Grzegorz Kończalski, ul. Wybickiego 22, PL-82-200 TORUŃ, Polio
1792 Konĉin Flores, Dehesa del Castillo 3-22, ES-46100 BURJASSOT, Hispanio
1793 Lázaro Rubio Martínez, Juan Antonio Simón 14, ES-????? ??, Hispanio
1794 Ester Cossaro, Via Ezzelino il Balbo 4, IT-????? PADOVA, Italio
1795 Migihaha Kimic, 714-16-6-1 Fukagawa Kotoku, Tokio, Japanio
1796 Encarnación Echevarría, Avda. Padre Esplá 66-2-B, ES-????? ALICANTE, Hispanio
1797 Saúl Orea, ??
1798 W-odmierz Matuszak, ul. Gospody 6C/24, PL-80-344 GDAŃK-Z'ABIANKA, Polio
1799 Andrzey Perkowski, ul. Biegańskiego 21/7, PL-??-??? GDAŃSK, Polio
1800 Joanna Rózga, Giemlice 83-126, PL-??-??? SUCHY DAB GDAŃSK, Polio
1801 Ewa Kowalewska, ul. Kruczkowskiego 15A/6, PL-??-??? GDAŃSK, Polio
1802 Aleksandra Kowalewska, ul. Kruczkowskiego 15A/6, PL-??-??? GDAŃSK, Polio

# VALENCIA SUNO

78a Universala Kongreso de Esperanto

Valencio, Palaco de la Muziko, 1993.07.24-31

Ĵaŭdon, la 29-a de julio | Numero 4 | Vendprezo: 25 p-toj

## Partopreneblis...

### Bankede kaj bale

Marde, en la tradicia bankedo, la tabloj, bele aranĝitaj, kun floroj kaj menukartoj, staris tuj ĉe la dancplanko. Supozeble tro frue por la hispanoj, la bankedo ne komenciĝis laŭ la horaro, sed la manĝaĵoj — antaŭplado, fiŝaĵoj kaj viando, kion sekvis glaciaĵoj, kafo kaj likvoro — estis tre bongustaj. Multaj servistoj zorgis pri la bankedanoj, kiuj ekdancis fine de la manĝo, kiam la muzikgrupo ekludis, iom laŭte sed varie. Je la 22:30 envenis la nebankedintoj kaj aliĝis al la festeno. Komparante ĝin kun tiuj de lastjaraj kongresoj, ĉi tiu estis plia ŝtupo al elstara balo, en kiu ĝis la 01:00 restis bonega amikeca etoso.

### 2-a IKEL-fakkunsido

Post enkondukaj atentigoj pri la diferencoj inter etnaj konfliktoj (SriLanko, Kurdio, Suda Afriko, italiaj kaj aŭstriaj slovenoj; eŭskoj, katalunoj, galegoj, asturoj kaj aragonoj en Hispanio, k.t.p.) kaj religiaj aŭ ĝenerale politikaj konfliktoj. Gradimir KRAGIĆ (kn 38), el Bosnio, skizis la brutalan militon en eksa Jugoslavio. En la posta diskuto estais emfazite ke, unue, divido de Bosnio Hercegovino inter Kroatio kaj Serbio neniel ĉesigus la militon, sed ke, due, nun ne plu imageblas refortiĝo de tiuj muzulmanoj serboj kaj kroatoj pledantaj por harmonia kunvivado de ĉiuj etnoj en komuna ŝtato. Oni memorigis ke la nuna interetna milito 'prepariĝis' jam en 1980/81, kiam — post la morto de Tito — Serbio komencis malkonstrui la aŭtonomion de Kosovo.

En la membro-kunveno estis prezentitaj la kutimaj raportoj kaj oni akceptis konsiderindan plialtigon de la kotizoj kaj elektis jenan estraron: Uwe Joachim MORITZ (platdiĉo), prezidanto; Daniele VITALE (padiano), vicprezidanto; Daniel HOUGUET (bretono), sekretario; Paul PEERAERTS (flandro), kasisto; Anita PERIČ-ALTHERR (slovenino), estraranino.

### Tago de la lernejo

Dum ĉiu ĉi programero, marde matene gvidita de la kongrestema regisoro prof. Duncan CHARTERS, oni analizis tion, ke la virino estas daŭre diskriminata en la eduksistemo. **Perkomputilaj lernprogramoj** aperas nuntempe amase, sed bedaŭrinde sen ia teoria pedagogio, kiu tamen ekzistas (ellaborita sub gvido de prof. Frank, kaj aĉetebla en la Libro-Servo). La spertoj de s-ino Mullarney MALANI montras, ke la **alfabetigo** okazu prefere en plej juna infanaĝo — pri kio oni devas informi la gepatrojn ĉie en la mondo. Prof. Charters raportis pri **morala edukado** en Usono, kie moralaj valoroj (honesteco, kuraĝo, pacemo, memfido, ktp.) estas specifaj instruceloj. Stefan McGILL prezentis la novajn lernolibrojn, nome la novan eldonon de *Tendaraj Tagoj*, precipe por 14-15-jaruloj, kaj la tute novan *Kunvojaĝi* por plenkreskuloj, verkitan de Paul GUBBINS. Tiuj libroj respondas al la postulo de moderna lingvo-instruado, kies bazo estas **realaj komunik-situacioj**.

Post la prelegoj formiĝis respektivaj laborgrupoj. Plia laborgrupo okupiĝis pri **klerigado en la tria mondo**. La ĉefaj celoj estas: unue, favorigi programojn por alfabetigo, samtempe en du lingvoj (la gepatra kaj esperanto), kaj due, utiligi esperanton por peri necesajn sciojn (ekzemple lernolibrojn pri matematiko, natursciencoj, teĥniko, ktp., en esperanto). La grupo decidis grupan aniĝon en **Monda Kunagado por Eduko, Scienco kaj Kulturo** (esperantista UNESKO-asocio), kaj utiligi ties revuon ***Monda Forumo***, i.a. por peri la laborrezulton de la grupo aŭ de grupanoj.

### KVIZO: Venu diskrevi pro rido!

Se vi volas spekti propraokule kaj propraorele aŭdi, kiel pluraj 'elstaraj' poetoj, aŭ similspeca faŭno, ĵus premiita en la Belartaj Konkursoj, ridindigas sin pri la esperanta literaturo kaj kulturo ĝenerale, **ne maltrafu la kvizon**, morgaŭ je la 11:00 en salono Régulo. Ridemuloj de la mondo, unuiĝu!

### TEJO-forumo

La prezidanto Saskia IZERDA (kn 1243) montris dum la marda TEJO-forumo diverslingvajn informilojn kaj la revuojn *TEJO tutmonde* kaj *Kontakto*. Ŝi informis, ke la neceso ŝpari minacas la pluan aperadon de Kontakto. Ankaŭ eblis informiĝi pri la venontaj junularaj kongresoj en Bulgario, Koreio kaj Rusio. Ĉi-lasta estos bonega okazo por la izolita rusa junularo. Post la raporto komenciĝis demandado de estraranoj. Interalie oni petis informojn pri la junaj esperantistoj en Ĉinio, Koreio kaj Japanio. En Ĉinio fondiĝis antaŭ nelonge nova asocio baldaŭ aliĝonta al TEJO. Oni longe parolis pri la rilatoj inter TEJO kaj internaciaj organizoj kiel UNO, UNESKO, E.E.K. k.s. TEJO ĝuas tie favoran reputacion pro la senĉesa kaj serioza laboro de kelkaj aktivuloj en tiuj elefantaj institucioj, kie svarmas internaj kvereloj. Oni demandis pri la oficiala sinteno de UNESKO rilate al esperanto kaj la pozicio de TEJO rilate al la neŭtraleco de la esperanto-movado. Oni komentis la fakton, ke en tiu ĉi kongreso estas pli da junuloj ol kutime, kvankam oni ankoraŭ ne scias la precizan kvanton. Laste, estis longe diskutita la oficiala teniĝo de TEJO pri la pretendo de katalunaj TEJO-anoj aperi en *Pasporta Servo* sub "Katalunio", aparte de "Hispanio".

### Fervojista jarkunveno

La 35 ĉeestantoj, post la saluto de prof. John WELLS, aŭskultis la vicprezidanton de IFEF, István GULYÁS, pri la ĵus okazinta 45-a IFEF-kongreso en Cervia (Italio). Poste, sekvis 2 fakprelegoj: unue, d-ro Ferenczy, prezidanto de UMEA, konigis la organizadon

## Vizito al televido

Hodiaŭ okazos vizito al redakcio de televidstacio en Valencia, sub la gvido de TEĴA-prezidanto Stefan MAUL. Oni petas, ke ĉiuj ĵurnalistoj, kiuj aliĝis por tiu vizito, kolektiĝu akurate je la 10:30 ĉe la ĉefpordo de la kongresejo, por ke la grupo povos alveni ĝustatempe ĉe la televid-stacio iom ekster la urbo. Estas ankoraŭ kelkaj liberaj lokoj. Se vi havas intereson pri tiu ĉi vizito venu je la indikita horo.

de la Fervojsanitara servo en Eŭropo kaj parolis pri la diverstipaj malsanoj inter la fervojistoj; due, I. Gulyás prelegis pri la atingitaj rezultoj por forigi la fervojan bruon en Brno (Ĉeĥio). Fine, okazis vigla diskuto kaj babilado pri la fervojista movado.

**Kunsido de la informa fako de U.E.A.**

La fortimiga distanco inter la du kongresejoj, trairenda sub ŝvitloga suno, ankoraŭan fojon ŝrumpigis la ĉeestantaron en programero okazinta en la lerneja konstruaĵo. Tamen alvenis pluraj el la homoj konate engaĝitaj en informado: i.a. Jean-Louis TEXIER, W.F. Huppertz, Edward SYMOENS, kaj John SPENCER. La diskuto gravitis ĉirkaŭ la tensio inter la neceso viglligi la informan agadon, eĉ (laŭ kelkaj) ĉefprioritatigi ĝin, kaj la manko de konvena buĝetero de U.E.A. Kompreneble pri tiu problemo decidos la estraro, kiu eble troviĝos sub komitata premo por grandigi la informan buĝeton.

Dolore sentiĝis ankaŭ la kontrasto inter la ebloj de modernaj informiloj kaj la modesta grado je kiu ni utiligas ilin. Precipe temis pri komputilaj retoj, kies jaraj uzantoj kutime fariĝas same entuziasmaj kaj porparolantaj de ĝi kiel esperantistoj de sia lingvo. Regis konsento ke ne nur informemuloj, sed — kaj ĉefe — la Estraro kaj la C.O. devus esti regula uzanto de komputila reto, kiu plirapidigos kaj eĉ malpli kostigos la kontaktadon.

**U.E.A.-kunsido pri eksteraj rilatoj**

U.E.A.-estrarano Mark FETTES gvidis 2-horan kunsidon pri la rilatoj de U.E.A. kun ekstermovadaj institucioj. Plej multe da atento ricevis la kunlaboro kun Unuiĝintaj kaj UNESKO. Kune kun la 50-jariĝo de UNO, U.E.A. planas fari kampanjon kiu kulminos en la Universala Kongreso en Tampereo, Finnlando, kie oni esperas aranĝi t.n. modelan asembleon de UNO por junaj esperantistoj de la tuta mondo. Progresas la preparoj por internacia simpozio en Graz, Aŭstrio, okaze de la Internacia Jaro de la Familio, en kiu esperanto estos la sola traduklingvo. La kunveno ankaŭ aŭdis konvinkan pledon de May BIJLEVELD (kn 1629) por la disvastigo de esperanto en ekologiaj rondoj, prepare al la sekvonta mondkonferenco pri ekologio. Interesitoj bonvolu kontakti ŝin rekte.

**Poŝtista kaj telekomunikista kunveno**

Malferme de la 27-a ĉefkunveno de IPTEA, kiun ĉeestis 7 kongresanoj, oni vigle diskutis pri la nuna situacio de esperanto en diversaj landoj. Poste, dipl. inĝ. Veikko MÄKI-LUOPA, finno, vicprezidanto de la asocio, prelegis pri la centjariĝo de la aŭtomata telefon-centraltekniko. Fine, li aldone informis pri la apero de la elektronika letero, kaj per fina debato tiel fermiĝis la kunveno.

**Kunsido U.E.A. pri kulturo**

Ĉeestis malmultaj homoj pro samtempaj kulturaj eventoj sed la diskutoj estos tre viglaj kaj interesaj. Post raportoj pri la ĉefaj kulturaj eventoj de la jaro tra Esperantio, oni substrekis la gravecon de malgrandaj aranĝoj kie artistoj povas prezentiĝi senĝene.

Oni ankaŭ invitis la kongresontojn en Seulo jam konatiĝi kun la korea kulturo (ekzemple per la revuo *Espero el Koreio*) por tiel partopreni pli konscie la venontan UK-on.

**IKU: Tonkin kaj La Torre pri la kongrestemo**

Mardе je la 12:00 horo prelegis en IKU-sesio d-ro Tonkin pri io kio tre rilatas al la kongrestemo — nova jarmilo, novaj universitatoj, kaj je la 16:00 d-ro Mauro La TORRE, kiu ankaŭ tre rilatis la kongrestemon — personigitaj malĉeaj instrusistemoj. En ambaŭ prelegoj oni atentigis pri la aliro al novaj studsistemoj kaj instrumetodoj survoje al la nova jarmilo. Tiusence, d-ro Tonkin montris la tradiciajn instrusistemojn kaj ties malstabilecon fronte al la novaj bezonoj en la universitato, klarigante la usonan kredit-sistemon kompare al la eŭropaj.

D-ro La Torre, klarigis unue la diferencon inter la tradiciaj instrumetodoj — kie la lernantoj kaj la instruisto troviĝas en la sama loko — kaj la novaj, malĉeaj — korespondaj kursoj, televidkursoj, komputilaj sistemoj, k.t.p.), kaj prezentis poste ne nur la instrusistemojn sed ĉefe la kontrolsistemojn.

**Prelegaro de naturkuracistoj**

La jarkunvenon de Esperantista Naturkuracista Asocio, kies devizo ne estas «returne al la Naturo» sed «antaŭen kun la Naturo», partoprenis 62 homoj. Ĝi konsistis el prezento de la Asocio — pri ties celo interligi la esperantistajn fakulojn pri naturkuracado, ties jarlibro kaj organo kaj pri aliaj agadoj —, kiun sekvis serio da prelegetoj pri kiropraktiko, akupunkturo, homeopatio, irisologio, psikoterapio kaj perpensa sanigado. Je la fino ĉiuj partoprenintoj ricevis resumojn de la prelegoj kaj la revuon Naturkuracado.

**Oomoto-kunsido**

Ĉirkaŭ 300 kongresanoj partoprenis lunde la Fakan Kunsidon de Oomoto, kiun oni komencis per Ĉinkon-meditado. Poste oni klarigis pri la deveno de Oomoto kaj ĝia rilato al esperanto, kaj sekvis praktika ekzerco pri *origami*, la japana paperfaldarto, kun esperantlingva instrukcia teksto. Antaŭ la fina te-ceremonio, prelegis HUZIMOTO Tatuo pri la kongresa temo.

**Afrika agado**

La kunven-gvidanto, U.E.A.-estrarano Hans BAKKER, skizis la celojn de la afrikaj kunvenoj de la pasintaj kongresoj, de 1987 ĝis nun. Poste, la (sola) afrika kongresano, Leonardo LUENA (kn 1732), el Angolo, parolis pri si, siaj klubo, urbo, lando. Multajn demandojn de ĉeestantoj li respondis, donante bildon pri la malfacilaj cirkonstancoj en Angolo, kaj pri la kuraĝa pluagado de la tieaj esperantistoj, malgraŭ la civila milito. Portugala Esperanto-Asocio kaj U.E.A. laŭeble subtenas ilin. Post tio, s-ino Annsibyll KAMPHAUSEN prezentis la historion de Afriko: kiel ĝia digna kaj sinproviza vivmaniero estas detruita en la lasta jarcento de fremdaj invadintoj. Afriko ne bezonas la helpon kiun invadintoj opinias taŭga. La ĉeestantoj ankoraŭ longe plu restadis en neformala interparolo. La giĉeto de U.E.A. pri Afriko bonvenigas ĉiujn kiuj interesiĝas pri ĉi tiu agado.

**Virina agado**

La kunvenon ĉeestis proksimume 50 gekongresanoj, kaj oni diskutis ĉefe pri kiel faciligi la partoprenon de junaj patr(in)oj kaj iliaj infanoj en esperanto-kongresoj. Oni proponis, i.a., organizon de dumkongresa vartejo, Csch-kursoj por

gefiloj kaj partneroj. Interesitoj povas kontakti Mareje van ERP (kn 0384), Jane EDWARDS (kn 823), kaj Ans BAKKER (kn 592).

**Filatelista kunsido**

Kvankam ne tre konvenis la dimanĉa tago nek la loko (salono Cseh, for de la kongresejo), ĉirkaŭ 20 filatelistoj kunsidis kaj parolis pri organizaj aferoj de sia asocio. Oni bedaŭris, ke ne ekzistas porokaza poŝtmarko de la hispana poŝto; s-ro SO Gilsu strebos por atingi specialan poŝtmarkon okaze de la Seula UK.

**Kunsido de ILEI**

Agadan bilancon pri la pasintjara laboro de la instruista ligo aŭskultis dimanĉe publiko plejparte konsistanta el ILEI-membroj. Pozitivaj eroj estas la plenumo de la defio oferti kvindek lokojn en kvar instruistaj kursoj en 1993. La ĉefa el tiuj okazis meze de julio en Kultura Centro Esperantista sub gvido de Duncan CHARTERS kaj SZMIDÉLIUSZ Katalin. Ĝi logis 12 partoprenantojn, el kiuj kvar venis, helpe de stipendioj, el Hungario, Rumanio kaj Albanio. Apogindaj estas ankaŭ la dua kaj tria gimnazioj de ILEI por junuloj inter 13- kaj 16-jaraj, okazontaj apud Valencio kaj en Koreio respektiva. Plej lasta atingo sur la eldona kampo estas la apero de baza aktuala metodika verko *Teorio kaj praktiko de lingvo-lernado* de Irena SZANSER (Polio), je ekvivalento de 24 NLG en la Libro-Servo, kie haveblas ankaŭ la ĝisdatigita represo de la unua kajero de *Tendaraj Tagoj* kune kun la dua. Negativaj elementoj estas malkresko de partopreno en aranĝoj de ILEI, ĉefe pro ekonomiaj faktoroj, kaj unuafoja deficito en la ILEI-financojn kuŝanta paralele kun eĉ pli akuta laborforta deficito. Fine, anonciĝis, ke restas liberaj lokoj en la 27-a ILEI-konferenco en Paterna (10 km de Valencio), kie tuta semajno kun programo, loĝigo kaj tri manĝoj tage, kostas nur 340 NLG (240 por iulandanoj). Komunan taksian veturadon al la konferenco oni aranĝos de la ILEI-budo je la 13:00 sabate. Aliĝilo por la 28-a konferenco en Koreio jam haveblas, kaj estrarano d-ro SO Jin Su informis pri la preparlaboroj.

## Ankaŭ Nederlando...

Reprezentanto de Nederlando salutis la kongreson dum la Solena Inaŭguro, kvankam tio ne enlistiĝis sur paĝo 2 de la lunda numero de Valencia Suno. Ni pardonpetas pro la eraro.

## Nemaltrafindos:

**Vegetarana Kunveno**

Hodiaŭ je la 11:00 en salono Privat okazos la kunveno de la Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio (TEVA). Ĉiu samidean(in)o estas bonvena.

**Dua Foiro de la Paco**

Hodiaŭ je la 16:00 en la vestiblo ekster salono Waringhien (ĉe la standoj de Amik' en Afrik' kaj Monda Kunagado). Aktivuloj kaj interesitoj pri agado por paco, ekologio, tria mondo, homaj rajtoj kaj similaj celoj estas elkore invitataj.

**16-a Esperantologia Konferenco pri historio**

La konferenco, okazonta vendrede matene (09:00-12:00) kaj posttagmeze (16:00-17:45) en salono Lapenna, traktos historiografian aspektojn de esperanto. Kontribuos i.a. U. Lins (problemoj de la historiografio de esperanto), R. Noltenius (i.a., alvoko savi dokumentojn kaj historiajn materialojn), Y. Hirae (Verda Majo kaj Generalo Mangada), J. Azcuénaga (esperanto dum la hispana milito), N. Rašić (sociologiaj aspektoj de historiografio), D. Blanke (metodologiaj aspektoj de laborist-movadaj esploroj).

## Libro-Servo

**Aŭtoraj duonhoroj:**

Hodiaŭ je la 18:00, Abel MONTAGUT prezentos premiere sian epopeon *Poemo de Utnoa* kaj sian tradukon de la poemaro *Cants d'amor* de Ausias March, en dulingva eldono, esperanta kaj kataluna.

Morgaŭ prezentiĝos je la 17:30 s-ro Fenestro, alinome HUZIMOTO Tatuo, reprezentanto de Ludovikito kaj ties *iam kompletigota plena verkaro de l. l. zamenhof.*

**Komputila programo pri esperanto**

Informoj pri la lingvo, historio, literaturo, muziko, organizoj, adresoj, bibliotekoj; 2000 vortoj en la germana versio, 500 en la hispana; vort- kaj frazekzerzoj, gramatiko — aĉeteblas en la Libro-Servo. Kunlaborontoj por alialingvaj version kontaktu OTTMAR Jareb (kn 1754).

## Programreŝanĝo!

La kunsido pri **eŭropa lingvo-politiko**, anoncita por la 11-a horo vendrede en salono Waringhien, anstataŭe (kaj finfine) okazos tuj post la kunsido pri orienta Eŭropo en salono Hodler, samtage. Aparta kunsido de 'Esperanto' Radikala Asocio ne okazos.

## Solo rekoncertas

Hodiaŭ, je la 16:00 en salono Zamenhof, Solo ludos refoje siajn sukcesajn komponaĵojn kaj krome versiojn de famaj klasikaĵoj. Akurate ĉeestu por ne maltrafi la komenciĝon de la koncerto. En la Libro-Servo ankoraŭ akireblas liaj disko kaj kasedo.

## Ankaŭ vi povas gajni premion!

**Valencio 93: Konkurso pri kongresaj impresoj.**

La L.K.K. de la 78-a Universala Kongreso, kunlabore kun Heroldo de Esperanto, organizas konkurson pri kongresaj impresoj, kun multaj valoraj premioj, inter kiuj videobendoj pri la valencia kongreso, kasedoj kun la kongresa kantato, memoraĵoj, kiel ekzemple senpaga jarabono al Heroldo por 1994, kaj premioj donitaj de la valenciaj aŭtoritatoj. Entute, kelkdekoj da premioj oni lotumos inter ĉiuj kiuj ĝis la fino de septembro 1993 sendos al Konkurso Valencio 1993, Gran Vía Fernando El Católico 45-3, ES-46009 VALENCIA, Hispanio, priskribon de siaj prikongresaj impresoj aŭ de la impresoj pri la estado en Valencio. La konkusaĵoj estu inter 10 kaj 100 linioj klare skribitaj, prefere tajpitaj, en unu ekzemplero.

Skribu pri ĉio, kio aparte interesis vin dum la kongreso, pri la plej belaj (aŭ malbelaj?) programeroj, pri viaj kontaktoj kun la valencia naturo, homoj, vidindaĵoj de la urbo, pri viaj dumkongresaj ekskursoj ktp. Skribu sincere, sed samtempe laŭeble bone uzu vian plumon aŭ tajpilon por konigi viajn sentojn, impresojn, ĉion kio profunde gravuriĝis en via koro, ekde la Interkona Vespero ĝis la Solena Fermo. La rezultojn de la konkurso oni anoncos en Heroldo de Esperanto, kaj la premiitaj personoj ricevos la premiojn perpoŝte. La premion oni lotumos inter ĉiuj pertoprenantoj de la konkurso, sed al la aŭtoroj de la plej interesaj konkursaĵoj oni atribuos specialajn premiojn en la formo de videobendoj pri la kongreso. Tute apartajn premiojn oni donos al ĉiuj aŭtoroj de prikongresaj artikoj en gazetoj. Se ili aperos nacilingve, oni sendu fotokopion kune kun la esperanta traduko. Nepre partoprenu la konkurson, popularigu ĝin inter viaj geamikoj, kaj ne forgesu pri la limdato — 1993.09.30. Sukceson en la lotumado de la premioj, kaj denove bonvenon en Valencio!

## Novaj aniĝoj:

1716 Ana María Cotella Ibáñez, ??, RA-7600 MAR DEL PLATA, Argentino
1803 Joanna Nazimek, Batalionów Chl-opskich 20/5, PL-??-??? GDYNIA, Polio
1804 Zyta Chojnowska, ul.Studzienna 25, , PL-87-100 TORUŃ, Polio
1805 Maja Sobocińska, ul. Drzewieckiego 3A/15, PL-80-464 GDAŃSK, Polio
1806 Krystiań Zawadzki, ul. Karlikowska 13B/31, PL-??-??? SOPOT, Polio
1807 Anna Sielienko, ul. Marynarki Polskiej 1384/29, PL-80-865 GDAŃSK, Polio
1808 Marcin Gójski, ul. Wileńska 55A/10, PL-??-??? GDAŃSK, Polio
1809 Małgorzata Draszanowska, ul. Skarzyńskiego 12c15, PL-80-426 GDAŃSK, Polio
1810 Katarzyna Kucharek, ul. Zylewicza 3/27, PL-??-??? GDAŃSK, Polio
1811 Elżbiet-a Or-owksa, ul. Spadzista 10/4, PL-??-??? GDAŃSK, Polio
1812 Zuzanna Szczepaniak, ul. Glinki 1/3, PL-??-??? GDAŃSK, Polio
1813 Ma-gorzata Dobrowolska, ul. Ukośna 18, PL-83-050 KOLBUDY, Polio
1814 Urszula Stolc, ul. Bajana 5A/10, PL-80-463 GDAŃSK, Polio
1815 Magdalena Stec, ul. Cha-ubińskiego 3/18, PL-80-809 GDAŃSK, Polio
1816 Aleksandra - ągwa, ul. Partyzantów 11B/24, PL-80-254 GDAŃSK WRZESZCZ, Polio
1817 Joanna Bystrzanowska, ul. Toruńska 2C/6, PL-80-822 GDAŃSK, Polio
1818 Joanna Bloch, ul. Rybacka, 1A/5, PL-80-340 GDAŃSK, Polio
1819 Sylwia Zeberkiewicz, ul. Grabowskiego 3C/34, PL-80-809 GDAŃSK, Polio
1820 Jay Kamchi, 2306 North Los Altos Drive, Chandler AZ 85224, Usono
1821 Karen Karpati, Gluskin 36, Rishon Le Zion, Israelo
1822 Magdalena Ga-ka, ul. S-oneczna 12/43, PL-82-300 EBLĄG, Polio
1823 Izabela Januszko, ul. Komeńskiego 28/5, PL-82-300 EBLĄG, Polio
1824 Blanka Janiszewska, Ma-opolska 5/7m2, PL-??-??? SOPOT, Polio
1825 Bartosz Kruszyński, ul. Missnera 6A/20, PL-80-462 GDAŃSK, Polio
1826 Jaros-aw Rawerski, ul. Zdrojova 7/3, PL-87-720 CIECHOCIWEK, Polio
1827 Micha- Danielak, Czajkowskiego 4/40, PL-??-??? GDAŃSK, Polio
1828 Anna Poczwardowska, ul. Pucka 3A/9, PL-80-392 GDAŃSK, Polio
1829 Izabela Skalska, ??, PL-??-??? GDYNIA, Polio
1830 Adam Przyklęk, Wita Stowskla 51/1, PL-??-??? GDAŃSK, Polio
1831 Andrzej Krzewski, Sztormowa 7D/30, PL-??-??? GDAŃSK, Polio
1832 Magdalena Kiliman, ul. 3-go Maja 3/2, PL-81-729 SOPOT, Polio
1833 Iwona Lukasik, ul. 3-go Maja 3/5, PL-81-729 SOPOT, Polio
1834 Izabela Witkowska, Bojanczyka 17/22, PL-87-800 W- OC- AWEK, Polio
1835 Ma-gorzata Jaraczewska, ??, PL-81-810 SOPOT, Polio
1836 Adam Tyrtania, Dickensa 1/7, PL-??-??? GDAŃSK, Polio
1837 Kamil Lipiak, ul. Wyzwolenia 2C/9, PL-83-110 ??, Polio
1838 Robert Tyrtania, Dickensa 1/7, PL-??-??? GDAŃSK, Polio
1839 Mariusz Kruciński, Ko-obrewska A2 A/81, PL-??-??? GDAŃSK, Polio
1840 Iwona Sobieraj, Ko-obrzeska 44C/3, PL-??-??? GDAŃSK, Polio
1841 Agnieszka Winiarsica, Wyzwolenia 19A/3, PL-??-??? GDAŃSK, Polio
1842 Krzysztof Sądej, ul. Szkolna 13/3, PL-??-??? PSZCZÓ- KI, Polio
1843 Maciej Skalski, Al Niepodleg-ośći 698/62, PL-??-??? SOPOT, Polio
1844 Julia Duszyca, ul. Koscielna 6a, PL-??-??? PSZCZÓ- KI, Polio
1845 Dariusz Ko-ecki, ul. Reymonta 3m18, PL-??-??? TORUŃ, Polio
1846 Maciej Drąg, ul. 3-go Maja 10/33, PL-09-402 I- OCK, Polio
1847 Bogna Sobieraj, ul. Sportowa 19, PL-83-032 PSZCZÓ- KI, Polio
1848 Karolina Tomkowicz, ul. Jana Daw-a 11 11, PL-83-150 PSZCZÓ- KI, Polio
1849 Krysztofa P-óuska, ??, PL-80-462 GDAŃSK, Polio
1850 Kukasz Kobejko, ul. Wita Stwosza 3, PL-83-000 PRUSZCZ GD., Polio
1851 Rados-aw Lzyz, ??, ??, Polio
1852 Adam Kokarski, ul. Wyznolenia 5A/5, PL-??-??? ??, Polio
1853 Rafa- Wdoniak, Wyzwolenia 51B/123, PL-??-??? ??, Polio
1854 Dorota W-odarek, Czyżewskiego 32A 4, PL-80-336 GDAŃSK, Polio
1855 Manuela Manhart, 1230 ????? Gasse, AU-???? ??, Aŭstrio
1856 Ewa Chabros, ul. Tobiasza 8A/1, PL-80-837 GDAŃSK, Polio
1857 Katarzyna Kosobudzka, ul. Parkowa 12/4, PL-81-722 SOPOT, Polio
1858 Marcin Stępniewski, Subisława 23c/8, PL-??-??? GDAŃSK, Polio
1859 Marta Swadzin, Aleja Wojska Polskiego 8A/1, PL-80-277 GDAŃSK, Polio
1860 Lucyna Gominsra, ??, PL-??-??? TORUŃ, Polio
1861 Anton Kiefer, ??, DE-67480 EDENKOBEN, Germanio
1862 Casimiro Álvarez, Argentino

### La Kontakto-T-ĉemizo estas prezidanteca

Dum la akcepto de membroj de Societo Zamenhof, la ĝenerala direktoro de U.E.A., Simo MILOJEVIĆ, sukcesis vendi Kontakto-T-ĉemizon al nia prezidanto, John WELLS, kiu laŭdire eĉ menciis la intencon surhavi ĝin dum la merkreda ekskurso. La grandeco preferata de la prezidanto estas 'L'. Ankaŭ vi povas akiri la Kontakto-T-ĉemizon en la Libro-Servo aŭ ĉe la TEJO-giĉeto.

### Savu historiajn materialojn!

La Instituto Fritz Hüser, organizinta la ekspozicion sur la halo de la kongresejo, kolektas kaj konservas materialon pri la internacia laborista literaturo, kaj alvokas al disponigo de tiutemaj dokumentoj donace aŭ pruntepor kopii kaj aldoni al la migranta ekspozicio. Tiel oni evitos, ke tiel valora materialo perdiĝu. Al ĉiuj donacintoj aŭ pruntdonintoj oni volonte donacos ekzempleron de la dulingva ekspozicia katalogo 113-paĝa kaj riĉe ilustrita, cetere aĉetebla en la Libro-Servo. La 30-panela ekspozicio estas prunteplenebla kaj prezentebla ankaŭ en aliaj landoj. Por ambaŭ aferoj eblas kontakti d-rojn Ulrich LINS (kn 519) aŭ Rainer NOLTENIUS (kn 1422).

# VALENCIA SUNO

## 78a Universala Kongreso de Esperanto

Valencio, Palaco de la Muziko, 1993.07.24-31

**Vendredon, la 30-a de julio** | **Numero 5** | **Vendprezo: 25 p-toj**


**Deklaro al la gazetaro fare de la gvidanto de la enlanda kaj eksterlanda kongresa gazetara servo.**

## La nuna stato kaj estonto de Esperanto

Respondante al demando pri la nuna stato kaj estonto de la internacia lingvo Esperanto, la opini-komisiito de la kongresa gazetara servo, Gian Carlo FIGHIERA, deklaris, ke ek de sia kreiĝo en 1887, Esperanto travivis du fazojn. En la unua fazo, Esperanto devis transiri de la stato de lingva projekto al tiu de vivanta, skriba kaj parola kultura lingvo, taŭga por ĉiuj celoj de la moderna vivo. Post tiu laboratoria fazo, dum kiu kreiĝis nova literaturo, la internacia lingvo nun troviĝas en la nova periodo, en kiu fariĝis aktuala la oficialigo de Esperanto.

Laŭ Fighiera, tiu ĉi lasta demando havas pure politikan esencon kaj estas solvebla ne de la esperantistoj, sed nur de la naciaj kaj internaciaj politikaj instancoj. Apartenas, do, al la respondeco de la ministerioj por publika instruado enkonduki Esperanton en la lernejajn stud-programojn. Por esplori tiun ĉi eblecon, la itala registaro — sekvante la opinion favoran al Esperanto de Umberto Eco — ĵus kreis interministerian studkomisionon. Ankaŭ ĉe la Eŭropa Parlamento de Strasburgo kaj ĉe UNESKO, kiu akceptis dufoje rezoluciojn pri Esperanto (1954 kaj 1985), la demando pri la internacia lingvo estas levita.

Fine de sia deklaro, Gian Carlo FIGHIERA neis, ke Esperanto havas ideologion. Li aldonis, ke la Esperanto-movado estas neŭtrala rilate al politikaj, religiaj kaj sociaj problemoj. Tamen, laŭ li, malantaŭ Esperanto troviĝas baza ideo de ĝenerala humanismo kaj respekto al la homaj rajtoj. Unu el ili, estas la respekto al la digno kaj egaleco de ĉiuj lingvoj, kiel postulas la Deklaracio de San-Francisko de la Unuiĝintaj Nacioj. Esperanto defendas la rajtojn de la lingvoj. «En sia regiono, estas bone, ke la homoj la regionan lingvon; je nacia nivelo ili uzu la nacian lingvon; kaj por internacia komunikado ili utiligu la neŭtralan kaj facilan lingvon Esperanto. Nur tiel oni evitas la maljustan superregon de unu lingvo super la aliaj.»

## Kroma gravula saluto.

Letere al la prezidanto de Unuiĝo Franca por Esperanto, la ambasadoro de Francio en Madrido, André GADAUD, skribis, ke li bedaŭras propran neĉeeston okaze de la inaŭguro de la 78-a U.K., kaj deziras al niaj kunvenoj la meritatan sukceson.

## Oni kaptis la ŝtelistojn!!

**Hieraŭ nokte ĉ. la 21:30, la priŝtelintoj de kelkaj kongresanaj aŭtoj estis finfine kaptitaj ĉe la freŝa faro.**

Kongresanino rimarkis, ke suspektinda paro da nekongresanoj malfermas aŭton parkitan antaŭ la Muzika Palaco, Citroën 2CV apartenantan al alia kongresano. Ŝi avertis la gardistinon de la kongresejo, kiu tuj vokis la policon kaj mem avertis kelkajn L.K.K.-anojn. La afero rapide sciiĝis, kaj pluraj kongresanoj proksimiĝis por zorgoplene rigardi, kio forlogis la paron al diskreta fortroto. La L.K.K.-ano José PÉREZ Sempere, heroe eksekvis la du malbonfarulojn je prudenta distanco de 200 metroj kaj duono. Rapide alvenis al la palaco du motorciklaj policanoj, kiuj, indikite de la deĵorantino, sekvis s-ron Sempere. Tiu ĉi, kaŝita malantaŭ arbo, almontris al ili la lokon, kie la ŝtelistoj intertempe sidis, memfidemaj pro sia ŝajna elturniĝo. La policanoj tuj arestis ilin kaj trovis en liaj poŝoj multe da diversa eksterlanda mono. Fine, la kongresanino iris al la policejo por la oficiala rekonado, akompanate de la loka U.K.-helpanto Antonio VERDÚ. Do, la zorgoj de la kongresanaro povas finfine ĉesi, almenaŭ ĝis apero de nova grupo de entreprenemuloj. Pro tio, lasu vian aŭton ĉiam bone ŝlosita, kaj interne neniam eĉ ŝajnajn valoraĵojn.

## Partopreneblis...

**IKU: Sur la spuroj de García Lorca**

Miguel FERNÁNDEZ Martín, konata hispana poeto nialingva, specialiĝis pri la verkaro de la granada poeto Federico GARCÍA Lorca. Ĝis nun li aperigis libroforme du teatraĵojn de tiu poeto, tradukitajn en vervan esperanton. Ĉi-prelege Fernández kompilas ĉiujn siajn spertojn pri la verkaro kaj vivo de García Lorca, akiritajn dum longaj elstudo kaj ekzerciĝado. Ĉi-matene, rakontis, deklamis, kantis, artismis super fajraj poemoj kaj viveroj de la murdita poeto. La publiko ne domaĝis aplaŭdojn, ĉefe kiam Fernández elgorĝis virtuozan interpreton el la fama andaluza kantspeco *cante jondo* (pr. "kante hondo"). La finajn versojn tiu-kantajn ĉiam kronis entuziasmaj *olé*-krioj, kaj ĉe la fino la spektantoj stariĝis por lasta aplaŭdo, io vere ne ofta en ĉi-U.K.-aj IKU-prelegoj.

### TEC-kunveno

La Terminologia Centro de U.E.A. okazigis ĵaŭde sian kunvenon. Tridek interesitoj, post enkonduko fare de Werner BORMANN kaj Detlev BLANKE, emfazis la neceson serĉi novan vojon por revigligi TEC. Interesitoj sin anoncu ĉe la provizora trikapa TEC-konsilantaro: Ian JACKSON (kn 531), Werner BORMANN (kn 521) kaj Amri WANDEL (kn 544).

### Galega lingvo-seminarieto

Lunde kaj ĵaŭde okazis la seminarieto pri la galegaj lingvo, socio, administracio kaj politiko, kiun partoprenis ĉiutage 15 kongresanoj. Abundego da ĉiaspecoj afiŝoj, vid- kaj son-bendoj, sepdeko da diapozitivoj, bunte ilustris la paroladojn de Antonio ALONSO (kn 1451), kiujn partoprenis la ĉeestantaro per multaj demandoj. Entute, la seminarieto daŭris preskaŭ 4 horojn, kaj je la fino oni donacis al la partoprenintoj informmaterialon.

La partoprenintoj ŝatis la prezenton, kiu estis vere universitatnivela, tamen multaj ne konsentis kun la celo de la galega registaro: unue plene revivigi, disvastigi kaj dignigi la galegan, kaj due atingi plenan dulingvismon kun la kastilia.

Estis bedaŭrinde, ke la aparataro funkciis nun en la dua tago, tiel ke la rezulto estis multe malpli bona ol ĝi devus esti.

### Tago de la paco

Cent dudek kongresanoj ĉeestis hieraŭ la tri interesajn prelegetojn kadre de la tago de la paco: **Ivo DURWAEL** argumentis, ke la pacmovado tro longe kredis je la efiko de bonaj strukturoj (ekz. leĝoj), kaj nesufiĉe atentis la problemon de simpla komunikado inter homoj. Li proponis, ke esperanto-asocioj multe pli klopodu plibonigi la komunikadon en siaj kunvenoj. **Elisabeth SCHWARZER** samopinis, ke esperantistoj ne sufiĉe konscias pri komunikaj problemoj aliaj ol la lingvaj. Ŝi metis emfazon sur la interkulturan komunikadon, kaj pledis por pli da kreivaj ludaj vigligaj aranĝoj en la Universalaj Kongresoj. Ŝi ankaŭ organizas esperantistan seminarion pri kontraŭ-rasisma trejnado. **Annsibyll KAMPHAUSEN** atentigis, ke por la homoj de la Tria Mondo, plej granda malhelpo estas la ŝuldoŝarĝo. Dum la lastaj jaroj, pro t.n. 'restrukturigo', duoniĝis la edukbuĝeto en afrikaj landoj kaj maldungiĝis instruistoj, tiel ke Afriko eniros la jarcenton kun pli da analfabetoj ol iam.

Post vigla disponigo dum 45 minutoj, tri laborgrupoj faris rekomendojn pri tio, kiel esperanto-kongresoj kaj esperanto-asocioj kaj individuaj esperantistoj klerigu sin kaj aktivi sin por klerigi aliajn pri interhoma kaj interkultura komunikado kaj por forigo de la ŝuldoŝarĝo de la Tria Mondo. Plenan raporto aperos en la revuo *Monda Forumo*.

### Vizito de ĵurnalistoj ĉe televido

Grupo de 14 esperantistaj ĵurnalistoj ĵaŭde vizitis televidon de Valencio (Kanalo 9). Oni montris al ili la modernan ekipaĵon kaj vidbendan filmon pri funkciado kaj celo de ĉi tiu regiona televid-stacio, kiu celas ankaŭ plifortigi la pozicion de la loka lingvo. Stefan MAUL, prezidanto de Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio, transdonis al la gastiganto de la televid-stacio kelkajn esperanto-gazetojn kaj la plej aktualan ezempleron de *Valencia Suno*.

### Ateista kunsido

Marde 15 gesamideanoj kaj unu observanto kunvenis kaj konstatis, ke neniu estrarano de ATEO (Asocio Tutmonda Esperanto-Organizo) kongresas. Oni protestis pro ĉiutaga lingva diskriminacio flanke de religiaj kredantoj, kaj ĉiu rakontis pri la deveno de sia nuna liberpensa situacio. Oni poste elektis Jesuo de las HERAS kiel interkongresan kunordiganton kaj kompilanton de la asocia revuo.

### Tao-studligo

Marde okazis kunveno por fondi Universalan Tao-Studligo Esperantista. Oni decidis peti aliĝon al U.E.A., post ellaboro de statutoj, kaj ankaŭ aperigi bultenon *TAO*. Ĉiuj interesatoj povas peti informojn de s-ro Moro (kn 855).

### Geja renkontiĝo

La jarkunveno de la Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj okazis merkredon vespere kun ĉeesto de dudeko da anoj el naŭ landoj. Ankaŭ ĉeestis dek valenciaj neesperantistoj, anoj de la loka geja organizo en kies klubejo L.S.G. kunvenis, laŭ afabla invito. La duhoran kunvenon plenigis vigla diskutado kaj informado pri la lastjaraj progresoj de L.S.G. en ĝiaj ĉefaj taskoj — informi gejojn pri esperanto kaj forigi antaŭjuĝojn pri gejoj inter esperantistoj. Poste, la L.S.G.-anoj kaj la valencianoj ĝuis kune grandan festmanĝon en tipe hispana restoracio.

Sekve de la kunveno, hieraŭ matene okazis duhora intervjuo pri esperanto kun kvar L.S.G.-anoj (el Francio, Germanio, Japanio kaj Usono) ĉe la loka stacio Radio Klara, kun traduko. La programo eĉ aŭskultigis esperanto-muzikaĵojn, kaj la tre pozitiva elsendo spronis telefonajn demandojn. La kvar partoprenintoj estis invitataj de la radio al hispana tagmanĝo kaj estos vendrede aparte intervjuitaj pri L.S.G.

### Azia aktivularo

Marde, en la matena kunveno, al kiu venis 20 homoj, ĉefe azianoj, ŝo komence raportis pri nuna stato de movadoj en aziaj landoj. Poste oni konkrete parolis pri problemoj de vizitoj de azianoj al aliies azia lando. Japanoj akceptis zorgi pri vizaj problemoj de vizitantoj por veni en Japanion. La kunsido temis ĉefe pri la venonta U.K., al kiu Ŝo volas vizitigi multajn azianojn, ekzemple vietnamoj, kampuĉoj, ktp., tra Ĉinio aŭ Japanio, tiel ke ili survoje multe lernu pri movadaj aferoj.

### Komuna meditado

Marde tagmeze, 70 homoj partoprenis la komunan meditadon, tute senigitan je religiaj signifoj kaj nur celantan al ena harmoniiĝo. La partoprenintoj opiniis tre pozitiva la sperton, kaj esprimis sian deziron, ke tia aranĝo okazu en venontaj esperanto-renkontiĝoj, seeble duonhoron ĉiutage, por profiti tian enan silenton regule. Helpus tamen, malpermesi bruon tro proksime de la medito-ĉambro, ĉar tio foje ĝenas la ekzercon.

### Interreligia konferenco

En tiu ĉi kunsido, okazinta marde matene, oni unue laŭtlegis enkondukon de la prezidanto de ASISTI (Asocio por Studado Internacia de Spiritaj kaj Teologiaj Instruoj), s-ro UMEDA Yosimi (kn 54), kiu, pro malsano, bedaŭrinde ne povis mem prezidi la kunvenon. Poste, prelegis por 15 minutoj s-ro Bradio MORO III (kn 855), de la taoisma vidpunkto, kaj s-ino FARKAS Eva, de la kristana vidpunkto. Kiel KELI-anino kaj edzino de kalvinismoa pastro, ŝi kortuŝe petis pardonon de la kristanaj eklezioj pro la maltoleremo kiun ili montris laŭlonge de la historio. Estos ankaŭ laŭtlegata la komunikaĵo de s-ro DEGUCHI Kyotaro, respondeculo de Oomoto. Poste, libere intervenis ĉeestantoj, i.a. s-ro François DEGOUL (kn 18), dirante, ke la maltoleremo ŝajnas veni ĉefe de la duobla heredaĵo: juda kaj greka, kombinitaj en kristanimo (el kiu siavice heredis islamo). Estis menciita la sektismo kaj ĝiaj katastrofaj konsekvencoj, kiel ekzemple la memmortigo de la Davida Branĉo en Usono

antaŭ kelkaj monatoj.

**Scienca aplikado de esperanto**

La kunveno pri scienca aplikado, gvidita de Amri WANDEL (kn 544), estis sekvo de la pasintjara iniciato Scienca Forumo en Vieno, kaj celis kunvenigi sciencistojn kaj interesiĝantojn pri la sciencia aplikado de esperanto. La kvalito kaj vigleco de la diskuto ŝirmis la iom malaltan nombron de partoprenantoj (ĉirkaŭ dudek), kaŭzita verŝajne de la maloportuna elekto de salono kaj tempo — marde tuj post la ISAE-kunveno —, sed en alia, malproksima konstruaĵo. Kiel dirite, estis vigla diskuto, kiu tuŝis la rolon de U.E.A. en scienca aplikado de esperanto, kaj ĉefe la kunlaboron inter sciencaj esperanto-arangoj. Specife oni diskutis eventualan kombinon inter la Internacia Kongresa Universitato, kaj Akademio Internacia de San-Marino. Oni emfazis, ke tia kombino povas esti tre alloga por multaj kongresanoj, kaj ke eblas realigi ĝin jam por la venonta U.K. en Seulo. Krome, oni traktis kreon de datumbanko pri sciencistoj kaj enplektiĝon en neesperantaj sciencaj arangoj, ekzemple pri lingvistiko, literaturo, informadiko aŭ ekologio. Bedaŭrinde, la mallonga tempo antaŭvidita ne sufiĉis por trakti la tutan tagordon.

**Muzikemula kunveno**

Lunde matene renkontiĝis muzikistoj kaj muzikamantoj en la kunveno de MEL (Muzika Esperanto-Ligo). La prezidanto Dimitâr TERZIEV raportis pri la agado dum la pasinta periodo: krom la bulteno, estis eldonitaj muziklibroj kaj kasedoj. Por la estonteco oni proponas du celojn: pligrandigi la nombron de MEL-anoj kaj disvastigi la agadsferon de la ligo.

**Blindula kunveno**

Post tempo-perdiga marŝado al la instruista lernejo, 20 vidhandikapitoj kun 9 akompanantoj, el 9 landoj, kunvenintaj lunde al la kunsido de LIBE (Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj), aŭdis surprizan alparolon de reprezentanto de *ONCE* (Nacia Organizo de Blinduloj de Hispanio) en Valencio, kompetente tradukitan de kn 1007. La organo *Esperanta Ligilo*, nun produktata en Ĉeĥio, rikoltis laŭdojn; Otto PRYTZ atentigis pri tio, ke ĝi estas la plej aĝa brajla gazeto en la mondo. **Jubileoj**: antaŭ dek jaroj ekaperis la kasedaj eldonoj de *Monato* kaj *Esperanto*; decembre la redaktoro de *Esperanta Ligilo*, R. Gonin, 80-jariĝos; en 1994 LIBE ekzistos 90 jarojn. **Kongresoj**: ne okazigo de IKBE (Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj) estis surprizo ankaŭ por la hispanaj samsortanoj, post komenca promeso. *ONCE* ja promesis subvencii partoprenon en U.K. al dek blindaj esperantistoj. La malfrua sciigo pri tio, tre embarasis la estraron, sed io pozitiva rezultis el la penadoj de la sekretario s-ro Karvinen. Inter aliaj, venis propono de s-ro Gonin refondi la hispanan sekcion. Fine, Bosnia kongresano rakontis pri la sorto de samideanoj en tiu loko, certe la plej emociiga parto de la kunveno.

## Kaj ankaŭ Japanio!

Samkiel la certe pli ol 121 japanoj, ĉiuj kongresanoj klare aŭdis la saluton de la japana reprezentanto dum la solena malfermo — escepte de la kompilinto de la fifama listo, kn 1450.

## Hodiaŭ!

## VIZITO AL LA INFANA KONGRESETO

### Aĉetu vian bileton tuj nun!

Plenkreskulo: 1000 pesetoj
Infano (5-12-jara): 500 pesetoj

La aŭtobuso ekiros de la U.K.-ejo je la 17:00 kaj revenos de I.I.K.-ejo je la 19:30 (por atingi Valencion je la 20:15, do antaŭ la Nacia Vespero).

## Nemaltrafindos:

La **koncerto de Puhova kaj Bronŝtejn**, neokazinta marde pro vizproblemo, okazos hodiaŭ en salono Zamenhof kadre de la Internacia Scenejo, kiu komenciĝos je la 11:00.

Poste kaj samloke, antaŭvideble je la 12:00, la portugala GAG-o (Grupo de Aktoretoj-Gebuboj, 7- ĝis 16-jaraj infanoj) rolos **kvar humurajn skeĉojn**.

**Mezlerneja instruista kunveno** invitas ĉiujn mezlernejajn geinstruistojn el la tuta mondo por prepari interŝanĝon de niaj gelernantoj kaj diskuti kaj rakonti antaŭajn spertojn; hodiaŭ je la 12:45 en salono Lapenna.

## Libro-Servo

**Aŭtoraj duonhoroj**

Hodiaŭ je la 12:00 okazos prezento de aktuala libro pri anatomio kaj fiziologio de la homa korpo, de Harald SCHICKE. La libro estas verkita precipe por nefakuloj.

Je la 16:30 M. Bronŝtejn prezentos sian *Legendoj pri SEJM*, anekdotaron pri la esperanto-movado en la Breĵneva Rusio. Li laŭtlegos kelkajn rakontojn kaj eĉ kantos.

## Kontakte!

**Tradukistoj**

Por pagata daŭra traduklaboro oni serĉas homojn kiuj kapablu bone traduki el esperanto al sia propra lingvo: rusa, hungara, rumana, albana, kroata, makedona, franca kaj angla.

Temas pri eldono de semajna parlamentana informilo kun uzado de esperanto kiel pontlingvo. Interesatoj venu al salono Hodler vendredon je la 12:00 aŭ serĉu s-ron U. Broccateli (kn 162), aŭ faksu al *Partito Radicale* (esperanto), +39-6-68805396

**Poeto**

Kelkaj legantoj demandis, kiam oni povos kunsidi kun poeto Eduard V. Tvarošek. Bedaŭrinde, li ne ĉeestas la kongreson, kvankam li aliĝis. Du tagojn antaŭ forveturo al Valencio, li rompis sian ŝultron. Lia poemaro *Sola en subsubiro* jam elĉerpiĝis en la kongresa Libro-Servo, sed ankoraŭ akireblas *Anekdotoj pri famaj homoj*, *Aforismoj*, *Frenezetaĵoj*, kaj *Ŝercoj*.

**Kontraŭmilite**

Oni organizas tutmondan manifestacion kontraŭ la milito en Bosnio-Herzegovino por la 11-a de decembro kaj oni bezonas landajn delegitojn por kunordigi la lokajn komitatojn. Se vi volas kunlabori, kontaktu urĝe kun ni per la anonctabulo: Noemi (kn 1400), Isabel (kn 1395) aŭ Arnald (kn 1707).

**Gazetaroj**

La adresaro de esperanto-gazetaro 1993 enhavas nomon kaj redakcian adreson de ĉ. 200 esperanto-gazetoj. Se via loka aŭ landa gazeto ne troviĝas en la listo, sendu specimenon al la redakcio de *Eventoj*. La adresaro estas senpage havebla ĉe la ILEI-giĉeto.

## Programŝanĝo

Eva BOJAĜIEVA prelegos pri ekvilibro-reguligaj mekanismoj de la homa organismo hodiaŭ de la 16:00 ĝis la 16:45 en salono Régulo.

## Postkongresaj partoprenontoj

Se vi aliĝis al unu el al Postkongresaj Ekskursoj de la 78-a Universala Kongreso (Andaluzio kaj Madrido), bonvolu renkontiĝi hodiaŭ je la 11:00 en salono Waringhien, por konatiĝi kun viaj kunekskursontoj, gvidantoj kaj interpretistoj, kaj informiĝi pri la lastaj, gravaj detaloj.

## Sur biciklo

De du jaroj BEMI (Biciklada Esperantista Movado Internacia) klopodis organizi biciklado(j)n al la Valencia U.K., kaj ĉefe zorgis pri tio homoj el Ukrainio, Nederlando, Hispanio kaj Okcitanio. Estis anoncitaj du veturadoj, ĉefe tra suda Francio kaj nordorienta Iberio. La plej impona, el Ukrainio, duonsukcesis pro rifuzo de la Franca Ŝtato liveri vizon — Dimitrij Ĉ. ankoraŭ atendas en Italio. Tamen ekde Avinjono Ivo M. (NL) sekvis la anoncitan programon, akompanate de Manolo P. (ES) ekde Andoro. Tio estis 1080 km en 10 tagoj. La alia grupo foriris iom pli frue de Laroque d'Olmes (Inter Andoro kaj Tuluzo): Guilhem kaj Guillaume (10-jaraj), Raphaël (11-jara), Elina kaj Edith (12-jaraj), kiujn akompanis Jorgos. Tiuj infanoj biciklis 800 km en 17 tagoj por renkonti survoje esperantistojn (ankaŭ kabeintojn), aŭtoritatulojn kaj ĵurnalistojn. Ilin intervjuis dek gazetoj, unu radio kaj unu televido! BEMI pluklopodas: informiĝu ĉe kn 1661, 711 aŭ 922.

## 80-a UK en Tampere

Giĉeto de la 80-a Universala Kongreso de Esperanto en Tampere, Finnlando, funkcias en la kongresejo. Eblas aĉeti glumarkojn, afiŝojn kaj T-ĉemizojn kaj ricevi materialon pri la kongresa urbo. La giĉeto funkcios tage ekde la 09:00 ĝis la 19:00 horo, sabate ĝis la 10:00.

La adreso de la L.K.K. estas:

**80-a U.K. de Esperanto**
P.L. 338
FIN-33101 TAMPERE
Finnlando

Bonvenon al la giĉeto
kaj al Finnlando!

## Radioamatoroj

Kun la helpo de la radio-klubo de Valencio, oni starigis radioamatoran stacion en la kongresejo (teretaĝe, suda flanko). Ĝis hieraŭ, okazis ĉirkaŭ 2000 radiokontaktoj, kaj per ili diskoniĝis la scio pri esperanto kaj nia kongreso. La reagoj estis tre favoraj. Ŝajnas, ke speciale en la nuna tempo de nekompreno inter multaj popoloj kaj aliaj grupoj la ideo de esperanto havas novan ŝancon. Memkompreneble, ni ankaŭ kontaktis niajn amikojn en esperanto, sed la propaganda efiko eksteren estis nia ĉefa celo. Ni povis konstanti, ke, inter radioamatoroj, esperanto estas pli bone konata kaj akceptata ol en plejmultaj aliaj kampoj. Por pli da informoj, kontaktu Hans WELLING (kn 55), DJ4PG@DK0MAV.


Finfine aperis...

**PASPORTA SERVO'93!!**

havebla en la Libro-Servo de UEA
1800 pesetoj


## Esperanto-literoj por komputiloj

La ĉapelitaj literoj ofte faris problemojn por esperantistoj, ĉar ordinaraj komputilaj programoj ne enhavas ilin. Tiuj problemoj ne plu devas okazi por la uzantoj de komputiloj PC-kongruaj (sub *Windows*) aŭ MacIntosh, ĉar la redakcio de *Eventoj* senpage disponigas kvar litertipojn por esperantistoj. La esperanto-literoj estas uzeblaj en ajna grandeco, kaj printeblaj sur matricaj aŭ laseraj printiloj. Pli detalajn informojn vi povas ricevi ĉe la ILEI-giĉeto aŭ de kn 616.

## Ĉu vi sciis, ke...

**...la Valencia Kongreso inspiris novajn gramatikajn principojn?**

La kongresanoj loĝantaj en unu el la studentaj loĝejoj kreis novan gramatikan principon tuj post la unua tiea matenmanĝo. Post la fama principo de *sufiĉo kaj neceso*, aperis la principo de ***nesufiĉa neceso***, t.e., uzo de duobla et: **etmatenmanĝeto.**

Aliflanke, al la **kantato** oni emas apliki la novan principon de duobla eg, ĉar ĝi estis **mirinda egkantatego...**

**...vegetaranoj vivas pli longe**

Rigardante la mezan aĝon de la pli ol 300 bankedintoj ni povus konkludi, ke pli longan vivon ĝuas vegetaranaj esperantistoj: se la meza aĝo de la ĉeestintoj estis 55, tiu de la 11 vegetaranoj estis 75. Por ilin premii, la ĉefkuiristo preparis specialan kaj ekzotikan vegetaranan menuon:

Antaŭmanĝo: po unu tomato, karoto, cepo kaj du folioj da laktuko; unua plado: unu ovo; ĉefplado: po 20-grama peco el tri diversaj fromaĝoj kun jogurto; deserto: unu pomo; trinkaĵo: akvo.

Ni instigu la viandvorajn esperantistojn sekvi la ekzemplon de la vegetaranoj, kiuj, krom pli longe vivi, helpadas forigi estontajn negativajn saldojn de U.E.A.: ili ja pagis 5000 pesetojn por tiu saniga menuo.

**...en Seulo okazos akvobataloj?**

Ĉiu el ni revenis dimanĉe nokte el la batalkampo kun florgardeno surkape, kaj necesas ja plukultivi ĝin per akvumado, ĉu ne? Do, en Seulo ni ĵetu unu sur la alian — akvosaketojn. La floroj bezonas akvon!

## Interese!

⇨ Ĉe la tablo de la Solena Inaŭguro sidis tri hispanoj, kaj du el ili portas en siaj familiaj nomoj la plej hispanecan literon: Ñ (prononcata proksimume kiel la esperantaj NJ): s-ro Antonio ALONSO Núñez kaj s-ino Rafela URUEÑA; la tria tamen havas esperantecan voknomon, eĉ se senĉapelan: Augusto CASQUERO.

⇨ La petolemaj esperantistetoj de la Internacia Infana Kongreseto ricevis donace 30 dekduojn da ovoj por ekskursaj omletoj! Espereble la ovojn ne trafis la infanoj antaŭ ol la kuirirsto.

# VALENCIA SUNO

## 78a Universala Kongreso de Esperanto

Valencio, Palaco de la Muziko, 1993.07.24-31

**Sabaton, la 31-a de julio** **Numero 6** **Vendprezo: 25 p-toj**


## La plej profesi-nivela gazetara servo.

Por la Valencia U.K. funkciis la plej ampleksa enlanda kaj eksterlanda gazetara servo de la lastaj jaroj. La preparlaboro komenciĝis jam kelkajn monatojn antaŭ la kongreso kaj sekvis la jenan skemon:

1. Selekto kaj enkomputiligo en Madrido de jena adresaro hispana kaj eksterlanda (entute 440 adresoj de 26 landoj):
   - 76 informagentejoj.
   - 190 tag-gazetoj.
   - 84 periodaĵoj.
   - 90 radi- kaj televid-stacioj
2. Sendo antaŭ la kongreso, el Madrido, de du preparaj informaj komunikoj.
3. Preparo de baza dokumentaro en hispana lingvo por ĵurnalistoj kaj kunvoko de du gazetaraj konferencoj, respektive en Madrido (internacia) kaj en Valencio (nacia).
4. Dum la kongreso, sendado per telefakso de tagaj unutemaj komunikoj al ĉ. 50 agentejoj kaj gazetoj. Entute estis faksitaj 7 mallongaj artikoloj (po iom pli ol duonpaĝo) en strikta ĵurnalisma stilo, kiuj celis doni unuecan kaj altnivelan bildon pri la internacia lingvo. La tekstoj aparte akcentis prestiĝajn aspektojn de la U.K. kaj de Esperanto, ekzemple:
   - -ke temas pri la sola internacia kongreso sen interpretistoj kaj sen tradukistoj.
   - -ke alvenis mesaĝo de la Papo kaj de la Nobel-premiito Camilo José CELA.
   - -ke estis luditaj kvin tradukitaj teatraĵoj de klasikaj kaj modernaj aŭtoroj. Okazis kvar koncertoj kaj kantato kun teksto originale verkita en Esperanto.
   - -ke estis montrita ekspozicio kun ĉ. 1000 titoloj en Esperanto, inter kiuj de klasikaj kaj nuntempaj hispanaj aŭtoroj.
   - -ke paralele disvolviĝis infana kongreseto kun 50 partoprenantoj el 12 landoj.
   - -ke universitataj profesoroj fakprelegis en Esperanto.
   - -k.t.p.
5. La duan kongresan tagon, la agentejoj kaj gazetoj, kiuj ĝis tiam ne publikigis la komunikojn, ricevis ĝentilan urĝigan telefakson.
6. La kongresanoj ricevis mallongan artikolon en Esperanto por traduko kaj publikigo en siaj lokaj gazetoj.

La agado donis eksterordinare pozitivan rezulton. Fotoj kaj artikoloj — kelkaj el kiuj tutpaĝaj aŭ plurpaĝaj — aperadis ĉiutage en la hispanaj gazetoj; ĉiuj televidstacioj filmis, eĉ plurfoje, aspektojn de la kongreso (ĉefe de la infana kongreseto); dekoj da radiostacioj dissendis intervjuojn pri Esperanto; senhalte la kongresa gazetara servo ricevadis informpetojn pri Esperanto: pluraj kongresanoj telefaksis sciigojn al sialandaj informagentejoj, gazetoj kaj radioj.

La nacian kaj internacian gazetaran servon prizorgis stabo da esperantistoj el Madrido kaj Santiago de Compostela, sub la gvidado de subskribinto. La nunjara laboro estis bremsita de malgrandigo de la koncerna buĝeto fare de U.E.A. Tamen, la tuta aktivado kaj la konsilaro de Stefan MAUL, profesia ĵurnalisto, permesis kolekti spertojn kaj krei modelon por venontaj kongresaj gazetaraj servoj.

La malfacilaĵo kuŝas en tio, ke tre ofte en L.K.K. ne troviĝas homo kun ĵurnalisma talento. Pro tio, la sola kongresa profesiulo — nome, la K.K.S. — devas transpeni ĉiujare la laboron kaj gvidi laŭ la supraj principoj la gazetaran laboron de la gazetaraj komisiitoj de L.K.K. en la estontaj U.K.-oj.

Gian Carlo FIGHIERA

## Internacia Ago-Tago: la 2-an de oktobro!

En la Viena U.K. estis interkonsento okazigi surstratan esperanto-aktivadon en la sama tago en diversaj landoj. Tiu samtempeco tre interesis ĵurnalistojn, kiuj ekzemple en Hungario dediĉis pro tio pli ol dek minutojn al esperanto en la centraj amaskomunikiloj. Ĉi-jare, la Internacia Ago-Tago okazos la 2-an de oktobro kun subteno de U.E.A. En tiu tago estas planata fari surstratan aktivadon (ĝi ne nepre devas esti manifestacio...) en pluraj eŭropaj ĉefurboj (Londono, Romo, Budapeŝto, Moskvo, ktp.) Interesiĝantoj de aliaj urboj petu pliajn detalojn ĉe SZILVÁSI László (kn 616).

## Venu al Koreio en 1994!

Post nur 2 U.K.-oj en Azio, kiuj okazis en 1965 en Japanio kaj en 1986 en Ĉinio, nun estas vico de Koreio montri al ĉiuj sian movadon, kulturon, vivon, ktp. Estas ankaŭ bona ŝanco por eŭropaj esperantistoj viziti Azion, kaj ne nur Koreion, sed ankaŭ Japanion (kie okazos antaŭ-kongreso en Hiroŝimo), Ĉinion, ktp.

Jam koreoj en la kongresejo akceptas aliĝojn al U.K. 1994, kaj ĉe ilia budo, antaŭ salono Régulo, vi povas spekti videobendon pri Koreio, ricevi broŝurojn, aĉeti belajn glumarkojn kaj afiŝon, informiĝi pri la kongres-kotizoj, hoteldetaloj, ktp.

Venu al Koreio en 1994 por ĝui ne nur U.K.-on, sed ankaŭ la gastamon de afablaj koreoj.

## Partopreneblis...

**Kvizo, kiu surprizis, amuzis, instruis**

Reenkondukita post pluraj jaroj, la demandarludo nomata 'kvizo' (ne serĉu en la vortaroj), eble neatendite, sukcesis brile. Hieraŭ je la 11:00, en salono Régulo, laŭ nova formulo, en unu sama sesio konkursis kvar trikapaj teamoj, kiuj devis alterne respondi longan serion da demandoj (facilaj, kaprompaj, erudiciaj aŭ strangaj) kaj pri la esperantaj historio, movado, leksikono, literaturo, k.t.p. La ludon gvidis plej vervo-sprite Georgo Kamaĉo, tiel ke la atento kaj ĝuo de la multnombra spektantaro (kaj de la anksiaj konkursantoj) neniam falis. Inter la kosmopolita ludantaro, la finalon inter la du antaŭe gajnintaj skipoj, ajnis la teamo inter 'Biere-ribele', formita de la italo Giulio CAPPA, la hungaro ERTL István kaj la franca Ĵak LE PUIL. Nur laŭdoj, la finaj komentoj: Brave!

**IEKA-kunsido**

En ĉeesto de sep partoprenantoj, la prezidanto de IEKA (Internacia Esperanto-Klubo Aŭtomobilista) raportis pri la agado de la pasinta jaro — kaj atentigas pri la malfacila ekonomia situacio. Oni instigis la membrojn subteni la klubon finance, per aĉeto de la blazono kaj de la banderolo *Esperanto — lingvo internacia.*

**Membro-kunveno de TEĴA**

Dudekdu kongresanoj, plej multaj el ili membroj de Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Organizo (TEĴA), ĉeestis la membro-kunvenon, vendrede je la 09:00, por diskuti la situacion de tiu fakasocio, unu jaron post 'refondo' (dum la U.K. en Vieno). Oni konstatis, ke kaj la asocio kaj ĝia fakorgano *Internacia Ĵurnalisto* kontentigas la membrojn, sed ke TEĴA frontas gravajn financajn problemojn. Pro tio la kunveno decidis plialtigi la jaran kotizon al 30 DEM. Krome, konkretiĝis preparoj por trejnado de ĵurnalistoj, eventuale per koresponda kurso. TEĴA kreis Premion Privat por honorigo de individuaj ĵurnalistoj; la kunveno por la unua fojo atribuis tiun premion al slovena ĵurnalisto de gazeto Oslobodjenje, Zlatko DIZDAREVIĆ, kies libro *Rakontoj pri la Sarajeva Sieĝo* aperos baldaŭ en Esperanto-traduko. (Informojn donas Ĵak LE PUIL, kn 613)

**EVA-kunsido (sen Adamo...)**

La partoprenintoj en la kunsido de EVA, Esperant-lingva Verkista Asocio, decidis ne malfondi EVAn kaj daŭrigi ĝian agadon sub la prezidanteco de G. Berveling kaj laŭeble kunlabore kun la revuo Fonto. Oni planas ankaŭ renkontiĝon de verkistoj kaj verkemuloj en somero 1994.

**Aŭskultantkunveno, kie oni ne nur aŭskultis...**

...sed ankaŭ partoprenis en vigla interŝanĝo de opinioj kaj spertoj en kunveno gvidata de red. A. Pettyn de Pola Radio. En la enkonduko, li substrekis la grevecon de radio-elsendoj por la esperanto-movado kaj la neceson plivastigi la reton de la regionaj, civitanaj, privataj radio-stacioj utiligontaj esperanton. Por faciligi estontan kunlaboradon de la redaktoroj de tiuj elsendoj oni planas okazigi venontjare rekontiĝon ĉi-teman en Talino, Estonio. En la diskuto pri plibonigeblo de aŭdebleco kaj uzado de modernaj radio-aparatoj, oni substrekis ke eĉ per malmulte kostaj radioriceviloj oni povas ricevi kontentigajn rezultojn, kondiĉe ke oni scias diversajn trukojn kaj manipuladon per teleskopa anteno, k.s. Etan instrukcion kiu faciligos la ricevadon de elsendoj ellaboros en septembro Pola Radio kaj senpage disponigos al ĉiuj interesiĝantoj (Pola Radio, E-redakcio, Box 46, PL-00-950 WARSZAWA, Polio). Krom tio, en la diskuto, oni substrekis la neceson de pli vasta popularigado de esperanto-elsendoj de diversaj stacioj, en e-kluboj, kursoj, k.s., samtempe akcentante la rolon de tiuj elsendoj en la movada informado, lingvokleriĝo kaj perado de kulturaj valoroj. Oni esprimis la esperon ke aŭtune almenaŭ unu kluban vesperon oni dediĉos al radioelsendoj en esperanto.

**Cseh-kurso kaj -seminario**

La Cseh-metodan kurson kaj seminarion organizitan de IEI partoprenis 25 lernantoj el 13 landoj. Krom la fidelaj lernantoj, vizitis la aranĝon por unu tago pli ol 10 interesatoj. La seminarianoj ekinteresiĝis pri la rektmetoda instruado, ekkonis la plej gravajn trajtojn de la metodo, observante la kursan instruadon havis eblon vidi la laboron en la praktiko. Multaj el ili intencas partopreni la B-gradan seminarion por plifortigi siajn konojn pri la metodo.

**16-a Esperantologia Konferenco**

Hieraŭ, pli ol 60 personoj sekvis la jam deksesan Esperantologian Konferencon, en kiu la prelegantoj klopodis prilumi la situacion de la historiaj esploroj pri la esperanta movado, atentigante aparte pri metodologiaj kaj sociologiaj aspektoj (Humphrey TONKIN, Ulrich LINS, Nikola RAŠIĆ, Detlev BLANKE). Sed ankaŭ estis raportoj pri konkretaj historiaj faktoj, ekz., pri la rolo de esperanto kaj esperantistoj en la hispana intercivitana milito (Juan AZCUÉNAGA, HIRAI Yukio) aparte gravaj estis la debatoj pri la rolo de arkivoj kaj bibliotekoj en la savado, konservado kaj disponigado de rekte per detruo minacataj dokumentoj (Luis FERNÁNDEZ Yzal, Reiner NOLTENIUS). La vigla diskuto substrkis la gravecon daŭrigi la temon.

La 17-a Esperantologia Konferenco, 1994 en Seulo, traktos la temon *Aziarigardo al Esperanto.*

**UALE-kunveno**

Prelegon pri la situacio de UALE (Universala Artista Ligo de Esperantistoj) ĉeestis 13 personoj el 17 landoj, el kiuj 7 estis pentro-artistoj. La ĉeestantoj ne povis decidi kiel solvi la malfacilan situacion de la ligo. Ne eblis elekti novan direktoraron pro manko de artistoj, kiuj devus transpreni la laboron de la nunaj prezidanto, sekretario kaj vicprezidanto. Ne partoprenis dancistoj, kantistoj kaj aliaj artistoj. La ĉeestintoj promesis pristudi la estontan agadon de la Ligo.

**Aŭkcio**

La aŭkcio alportis ĉi-foje tre bonan rezulton: 158 520 pesetojn — duoblo de la rezulto en la pli granda U.K. en Vieno. La plej altan prezon (8000 pesetoj) atingis *Eterna Bukedo*, de Kalocsay. D-ro Yungmyung KIM fariĝis kn 1 de la Seula Kongreso por 4000 pesetoj. T-ĉemizo de *Kontakto* kun aŭtografoj H. Tonkin kaj J. Wells vendiĝis por 2400 pesetoj.

**Kunveno de Monda Turismo**

Hieraŭ okazis kunveno de la Asocio 'Monda Turismo' kiun partoprenis ĉirkaŭ 80 personoj. Prezidanto de la Asocio, A. Grzębowski, rakontis pri la nuna situacio en esperanto-turismo, kiu, malgraŭ ekonomiaj malfacilaĵoj, daŭre disvolviĝas, kaj komunikis pri rezultoj de ĵus okazinta 9-a konferenco de M.T., en Poprad (Slovakio), kiun partoprenis 48 reprezentantoj el 10 landoj; temis ankaŭ pri estontaj aranĝoj kiujn organizoj aŭ aŭspicios M.T., i.a., pri foiro de e-turismo en Bydgoszcz (Polio) ĉi-jare kaj pri Internacia Esperanto-Kongreso kaj Eŭropa Esperanto-Forumo, en Budapeŝto, venontjare.

Dum kunveno estis enmanigitaj gratulleteroj al honoraj anoj de M.T. — M. Wearing (Aŭstralio), W. Harmon (Usono) kaj O. Mifsud (Malto), kiu multe faras por e-turismo.

Estraranoj de la asocio — M. Zvara (Slovakio), L. Harmon (Usono), Evva M.

(Hungario) kaj A. Salomatov (Rusio) — informis pri la aktuala stato de e-turismo en siaj landoj kaj pri planoj por estonto.

Resume, A. Grzębowski, alvokis ĉiujn e-vojaĝantojn unuiĝi pli por plifortigi la agadon en e-turismo.

**Vegetarana Kunveno**

Ĵaŭdon okazis la kunveno de la Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio (TEVA). Gvidis la kunvenon vicprezidanto s-ro William SIMCOCK, kiu prezentis salutmesaĝon de la prezidanto, Christopher FETTES, kiu zorgas pri la infana kongresceto kaj tial ne povis ĉeesti. Prelegis s-ro Ejnar HJORH, el Danio, pri *La kosmologio de Martinus*, prof-ino Catina DAZZINI el Italio pri *Dieto, vivmaniero, medio*, s-ro Harry MATHER el Britio pri siaj vegetaranaj vivspertoj, kaj s-ro William SIMCOCK el britio pri *Pluvarbaregoj: Kial viandomanĝantoj detruas la planedon*.

La ĉeestantoj partoprenis en la diskutado kaj donis interesajn sugestojn. Lastatempe la bulteno de TEVA ne aperis. La asocio havas nur *La letero de Esperantista Vegetarano*, kiu estas rapida kaj konciza informilo. Krom ĝi, jam estas preta la kolora jara kajero *Esperantista Vegetarano*, kiu profundigas la temojn de ambaŭ movadoj, esperantista kaj vegetara, kaj ricevis la aprobon de ĉiuj ĉeestantoj.

**Kunveno pri kompara religio**

La ĉefa punkto de la ĉi-jara kunveno, okazinta marde matene, estis la decido pri aliĝo de ASISTI (Asocio por Studado Internacia pri Spiritaj Instruoj) al *IARF* (*International Association for Religious Freedom*), kiu estas la plej malnova kaj verŝajne la plej grava tutmonda interkreda organizo, fondita en 1900, kaj en kiu jam individue partoprenas kelkaj esperantistoj. Ŝajnis al ĉiuj, ke tiu aliĝo ne estas kontraŭa al la neŭtraleco de nia asocio, ĉar la agado de *IARF* por subteni minacatajn aŭ subprematajn religiojn kongruas kun la punkto de la statuto pri aktiva neŭtraleco, ekzemple laŭ la modelo de Amnestio Internacia. Oni elektis du novajn estraranojn, Pascal LECAILLE kiel kasiston, kaj François DEGOUL (kn 18) por la eksteraj rilatoj.

Fine, oni atentigis pri la unua Interreligia Seminario lanĉita de ASISTI, kiu okazos de la 2-a ĝis la 5-a de aprilo de 1994 en Ĉeĥio.

---

**LASTA ALIĜO:** 1863 bmsz-k Francisco Belmonte, Biscaia 430 at 3, ES-08027 BARCELONA. Hispanio

## KOMITATKUNSIDO

La Komitato de U.E.A., nia parlamento, kunsidis entute dekdu horojn dum la U.K. Hieraŭ ĝi finis sian laboron kaj akceptis i.a. buĝeto por 1994. La buĝeto finiĝas per negativa saldo de 38000 NLG. Tio signifas, ke por la tria sinsekva jaro, la negativa saldo malkreskas kaj sekve, la financa farto de U.E.A. pliboniĝis.

Oni akceptis bazajn pricipojn por redakti novan regularon pri delegita reto. Laŭ ili, la delegitojn oni nomumos por trijara periodo kaj kondiĉo por la daŭrigo de delegiteco estos bona plenumo de la taskoj. Aparte strikte oni kontrolos la kvalifikojn de la fakaj delegitoj.

La Ĝenerala Sekretario ricevis multajn ideojn, ofte sufiĉe malsamajn, por redakti gvidliniojn pri la lingvo-politiko de U.E.A. Oni celas, i.a., pliklarigi la sintenon de U.E.A. rilate la rolon de la Akademio de Esperanto, same rilate la estontecon de Plena Ilustrita Vortaro. Oni nuligis la nunan regularon de la Terminologia Esperanto-Centro, kaj nomis komisionon por prizorgi la rilatojn de TEC kun eksternmovadaj terminologiaj instancoj, ĝis la agado de TEC estos reorganizita laŭ nova maniero.

Rilate la agadon en Eŭropo, la Komitato instigas al plurlanda kunlaboro (ekz., kongresoj). Ĝi tamen avertas, ke oni ne tro facilanime deklaru iun kongreson 'eŭropa' se ĝi ne ampleksas la tutan Eŭropon.

La komitato ankaŭ resumis sian viglan diskuton pri la strategio de U.E.A. En la diskuto aperis du 'skoloj': tiuj, kiuj emfazis la disvastigon de Esperanto, kaj tiuj, por kiuj pli gravaj estas la disvolvado de la uzebleco de la lingvo. En la definitiva strategio, pri kies ellaboro okupiĝos la Estraro, antaŭ ol la demando revos al la Komitato, ŝajnas estiĝi taŭga sintezo de tiuj emfazoj. Temos pri strategio de kresko (kvanta kaj kvalita). Ĝi inkluzivos ankaŭ la rolon de U.E.A. kiel reprezentanto de la monda e-komunumo ĉe la ekstermovadaj instancoj, same kiel ĝian taskon okupiĝi pri aferoj, kiuj estas ekster la kapablo de individuoj kaj landaj organizaĵoj.

**Flaviĝinta verda himno...**
Dum la Nacia Vespero (kiu komencis ĝuste post la oficiala redakto-fino de tiu ĉi lasta numero...), la Valencia Orkestro prezentis, i.a., filharmonian prezenton de *La Espero*, el kiu ili havis arkivpartituron ekde 1909, kiam d-ro Zamenhof vizitis postkongreson en Valencio okaze de la tiujara U.K. en Barcelono!

## IKEL ĉe la ministro

Ĵaŭdon, sespersona delegacio de la Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj (IKEL) havis longan interparoladon informiĝan kun s-ro Jesús HOUGUET i Pascual, ĝenerala direktoro pri lingvo-politiko en la Valencia Ministerio pri Kulturo, Edukado kaj Scienco.

IKEL volis surloke informiĝi pri la lingva situacio en Valencilando. Enkonduke, s-ro Houguet substrekis, ke la norma valencia estas identa al la kataluna lingvo, parolata ankaŭ en la Balearaj Insuloj, Andoro, Rusiljono kaj *L'Alguer*. La delegacio eksciis pri la bonegaj rezultoj de normaligo de la valencilingva instruado en la unua kaj mezgrada niveloj: antaŭ dek jaroj, nur en ok lernejoj oni instruis per la valencia lingvo, kaj nun estas pli ol 400 lernejoj. Ĉiuj infanoj (ĝis la 16-a vivojaro) devas lerni la valencian lingvon, ankaŭ tiuj, kiuj vivas en tradicie kastililingvaj regionoj. La lingvo estas nuntempe valorigata — ekzemple, kono de la valencia egalas al sesjara profesia sperto en la kampo de justico kaj sanitaraj aferoj. Interesa estas ankaŭ la devigo de la administracio rilati kun la civitanoj en ties lingvo. La ĝenerala direktoro atentigis pri la ekzisto de grupoj kiuj, sub la pretekso defendi la kastilian, fakte atakas kaj subfosas la normaliĝon de la valencia lingvo. La delegacianoj ricevis ampleksan dokumentan materialon pri la stato de la valencia lingvo kaj pri ties juraj baroj. Aparte ĝojiga estis la deziro de la Ministro pri Kulturo, Edukado kaj Scienco, s-ro Andreu LÓPEZ Blasco (membro de la Kongresa Honora Komitato), akcepti la IKEL-delegacion. Interesatoj kontaktu kn 501 aŭ kn 841.

## Abonu al *Kontakto*!

Ĉu vi scias, ke la komitato de U.E.A. eĉ dufoje aplaŭdegis, kiam ĝi traktis la ĉapitron pri Kontakto en la jarraporto? Komitatano HUZIMOTO Tatuo anoncis, ke la nova *Kontakto* estas interesa, bela kaj moderna, ke li tuj abonis ĝin por tri jaroj! Ĉu vi jam abonas al *Kontakto*? Se ne, vi devas fariĝi abonanto ĉe la giĉeto de la kasisto de U.E.A. Eblas ankoraŭ aboni por la nuna jaro.

## Terura fenomeno!

Kun multe da plezuro mi venis en Valencion antaŭĝuante mian partoprenon en la Universala Kongreso. En niaj kongresoj ĉiam estas io surpriza, io tute ne atendita.

Tia estas la besto-ĝardeno, kiu ĉi tie en Valencio estas tute alia ol ordinaraj besto-ĝardenoj:

Dum en aliaj la homoj kaj la bestoj estas apartigitaj per kradaj bariloj, tiel ke unuj ne ĝenu la aliajn, ĉi tie la bestoj kaj homoj povas interpromeni unu kun la aliaj, kaj ŝajne sen ia ajn ĝeno.

Kaj dum en aliaj la diversaj specioj estas apartigitaj, kaj rekoneblaj per siaj kaĝaj ŝildoj, ĉi tie oni povas rekoni la bestojn, nur kiam ili kungrupiĝas ĉe unu loko, ĉar alie ili aspektas samkiel homoj!

Kaj plej strange estas ke tiuj bestoj, male al kio okazas en normalaj besto-ĝardenoj, apartenas ĉiuj al la sama specio: ili estas ĉiuj krokodiloj.

Do, la miraklo en la kongresa besto-ĝardeno estas ke homoj kaj krokodiloj, kiuj kutime ne povas kunvivi, nuntempe povas.

Mirigas plie, tamen, la kialoj kaj kaŭzoj de tiu fenomeno: krokodiloj, en taŭgaj klimatoj, ĉiam vivadis **apud** homoj, sed neniam **inter** ni.

Kiaj estas la kondiĉo-ŝanĝiĝoj kiuj kaŭzis tian kreskadon de la krokodiloj? Ĉu kaŭzis ĝin polucio? Ĉu la streboj de la mediprotektantoj estas jam vanaj? Ĉu jam gena mutacio okazis, kaj nun ekzistas homaspektaj krokodiloj?

Aŭ ĉu, eĉ pli terure, homoj mutaciis al krokodiloj? Bedaŭrinde, ĉi-lasta ebleco ŝajnas plej verŝajna...

Oni povas nur esperi, ke iel mirakle la medikondiĉoj reŝanĝiĝos kaj tiuj besto-homoj por ĉiam malaperos.

## Mia travivaĵo marde matene

En la ĉefa stacidomo de Valencio estas turisma oficejo. Mi eniris kaj demandis hispane:

—Donu al mi informojn en esperanto.

La sinjorino ridetis kaj respondis:

—Ni ne parolas esperanton.

—Ja, sed estas la Universala Kongreso de Esperanto en Valencio, bonvolu doni al mi ion en esperanto.

—Ni havas nenion. Nur angle — ŝi diris kaj ridetis malestimete.

(kn 973)

## Lastaj fortoj el la Redakcio

Ĉi tiuj ses numeroj de *Valencia Suno*, konsistigis por siaj redaktoroj, Marcos CRUZ (Hispanio, kn 1079) kaj António MARTINS (Portugalio, kn 1290) tre valoran sperton, kio igos vere neforgesebla tiun ĉi ilian unuan Universalan Kongreson. La deviga malĉeesto al ĉiuj kongresaj programeroj kaj la konstanta tajp- kaj kompost-deĵorado en la kuriera redaktejo — de maks. la 08:45 ĝis min. la 22:45 — estis eĉ malalta akirprezo de tiom multaj riĉigaj spertoj, el kiuj plej elstaras la kunlaboro kun ĉiuj kiuj iel kontribuis al la Kongresa Kuriero:

AGŌ Takasi
Marija Pozder ALMADA
António da Silva ALMEIDA
Antonio ALONSO NÚÑEZ
Ans BAKKER
Hans BAKKER
Miguel Faria de BASTOS
Yves BELLEFUILLE
Simon BENNETT-DAVIES
Rafa BLANCO
Detlev BLANKE
Eva BOJAĜIEVA
Umberto BROCCATELLI
Osmo BULLER
Adolf BURKHARDT
Augusto CASQUERO
Duncan CHARTERS
Jorgos COMTE
José Luis CRUZ GARCÍA
DAI Liming
Peter DANNING
Liven DEK
Jane EDWARDS
Mareje van ERP
ERTL István
Mark FETTES
Lilia FABRETTO
Miguel FERNÁNDEZ
Mark FETTES
Gian Carlo FIGHIERA
Gunnar GÄLLMO
Aldo de GIORGI
Thomas GOLDMAN
Andrzej GRZĘBOWSKI
GULYÁS István
Miguel GUTIÉRREZ ADÚRIZ
Àlex HUMET
Saskia IZERDA
Ian FANTOM
Georgo KAMAĈO
Jay KAMCHI
Reza KHEIR-KHAN
Ksela
Leon KOBIELA
KÓBOR Lajos
Alica KOMLÓSI
Bodil KÜHLMANN
Jukka LAAKSONEN
Christian LAVARENNE
Michela LIPHARI
Vilhelmo LUTERMANO
Veikko MÄKI-LUOPA
Arnald MASSANAS i Daunis
Stefan MAUL
Stephan McGILL
Lawrence MEE
Ine MEULENDIJKS
Rob MOERBEEK
Abel MONTAGUT
Uwe Joachim MORITZ
Bradio MORO III
César de MOSTEYRÍN
Jozef MURĴAN
Gonçalo NEVES
Rainer NOLTENIUS
OTTMAR Jareb
José PÉREZ SEMPERE
Andrzej PETTYN
Gianfranco POLERANI
Nikola RAŠIĆ
Hugh P. REID
Lupe SANZ
Harald SCHICKE
Hubert SCHWEIZER
SMIDÉLIUSZ Katalin
SZILVÁSI László
SO Jinsu
Josef ŜEMER
Danny TEN HAFF
Dimitâr TERZIEV
Jean-Louis TEXIER
Zlatko TIŜLJAR
Rafaela URUEÑA
Amri WANDEL
Hans WELLING
John WELLS

...kaj ankoraŭ du-tri nesubskribintoj. Ĉies opinioj kaj raportoj nemalhaveble kontribuis al tiu ĉi vera *Valencia Puno*. Laŭdojn kaj kritikojn ni samatente arkivis.

## Raporto pri la lasta evento, okazinta en la kongresejo

Ĉiuj kongresanoj sinadiaŭis reciproke, dezirante unuj al aliaj bonan vojaĝon, sanon, feliĉon kaj ke ili denove renkontiĝu en Seulo (Koreio)